



ESPERANTO

NOVEMBRO 1961

esperanto

NOVEMBRO 1961

5 4 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 672 - (11)

Fondito : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro :
W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannan-
shire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2,
Nederlando, Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964
TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ**
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon
al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro
15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld,
1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la
respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezi-
danto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi,
Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47,
Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South
Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca
3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 57,
Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :

*La fama ĝardeno Tivoli en Kopenhago, urbo de nia
47a U.K.*

Enhavo

Esperanto en la danaj lernejoj	181
Dua kurso por geinstruistoj en Barlaston, Anglujo	183
La Esperanta literaturo de jan. 1954 ĝis majo 1961	184
Kiel ni mortigadis leporon por la antaŭkristnaska vespermanĝo	186
La akcidento, de Orriols	189
Foto-Ekspozicio "La homaro" : Premiitaj verkoj	190
Geografia semajno en Leicester	194
Infanoj ne konas limojn	195

Rubrikoj

La Internaciaj Konkursoj	183
Novaj Libroj	191
Nia forumo	193
Ŝaka Rubriko	194
La Juna Vivo	195
47a U.K.	196
Esperantista vivo & Nekrologo	197
Tra la mondo	197
Oficiala Informilo	199
Radio	200

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

ESPERANTO EN LA DANAJ LERNEJOJ

En la oktobra numero de "Esperanto" aperis mallonga lastmomenta informo pri la enkonduko de la Internacia Lingvo kiel libervola objekto en la danajn lernejojn kaj pri la prelegoj en la danaj porinstruistaj seminarioj. Temas pri du gravaj pliaj sukcesoj, kiuj antaŭenigas unu el la ĉefaj nuntempaj klopodoj de U.E.A.: la vastigon de la instruado de Esperanto en la lernejoj kaj la subskribon de Interŝtata Konvencio pri laŭgrada, paralela enkonduko de la lingvo en la lernejojn de pluraj landoj. Tial la nova atingo en Danlando meritas iom pli detalan, kvankam necese konci-zan, pritrakton.

Nedeviga objekto

Rezulte de pluraj rimarkinde elstaraj aranĝoj en Danlando, precipe en Kopenhago, inkluzive, ekzemple, la brilan Zamenhof-feston en 1959; de korekta kaj celtrafa informado; de rektaj klopodoj ĉe la edukaj instancoj de Danlando, la nova instruprograme de la Ministerio de Edukado enkondukis la Internacian Lingvon kiel nedevigan objekton en la okan kaj naŭan klasojn de ĉiuj lernejoj, kiel ankaŭ en ĉiujn vesperlernejojn. La instruado komenciĝis en la lerneja jaro 1961-1962. Pri tio aperis informoj en la dana gazetaro.

Kvankam en Danlando troviĝas sufiĉe multaj instruistoj kapablaj instrui la Internacian Lingvon, tamen montriĝis, ke estus utile informi la gestudentojn en la porinstruistaj seminarioj pri la esenco de la lingva problemo en la hodiaŭa mondo kaj almenaŭ pri la ĉefaj ĝisnunaj atingoj de Esperanto kun la celo instigi al lernado de la lingvo. Laŭ la iniciato de lernejestro S-ro Stig Hansen mi ricevis la inviton viziti Danlandon kaj fari prelegon en la porinstruistaj seminarioj sub la aŭspicioj de la Ministerio de Edukado, kiu financis la vojaĝon. Kvankam tre okupita, mi opiniis ke ne estas eble preterlasi tian unikan okazon kaj akceptis la proponon.

La preparlaboroj

En Kopenhago tuj formiĝis aparta malgranda komitato por bone organizi ĉion. Ĝi konsistis el Gesinjoroj Stig Hansen D-ro P. Neergaard, S. Dragsted, S. Ziegler kaj K. Zacho. S-ro Stig Han-


sen ĉefe rilatis kun la diversaj seminarioj, dum S-ro Ziegler, la gvidanto de la Informa Fakto de C.D.E.L., prizorgis taŭgan informadon. Kiam mi alvenis en Kopenhagon la 16-an de septembro, ĉio jam estis perfekte antaŭpreparita kaj organizita.

La prelegvojaĝo

Kiel temon de la prelego mi elektis "La Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj kaj la Solvo, kiun Prezantas la Internacia Lingvo Esperanto". Ni interkonsentis, ke mi parolos en Esperanto kun sinsekva traduko en la danan, parton post parto. Ni decidis, ke la prelego, kune kun la traduko, ne daŭru pli ol unu horon, tiel ke estu sufiĉe da tempo por demandoj kaj respondoj. Plue, ni kunportis malgrandan ekspozicion de libroj kaj gazetoj, kiun prizorgis Sinjorino B. Zacho, tiel ke en ĉiu seminario, se la cirkonstancoj permesos, ĝi povu esti aranĝita. Krome, ni kunportis konvenan dokumentaron, inkluzive la dokumenton CED/5 en la dana kaj dokumenton pri lernejoj, kun la



Lektoro Sinjoro Juul en konversacio kun la preleginto antaŭ la konstruaĵo de la granda Ŝtata Seminario en Rarum (Jutlando) post unu el la plej sukcesaj prelegoj, kiun ĉeestis 260 gelernantoj kaj 10 instruistoj.



Dum la prelego en la modernega privata Seminario de Skive (Jutlando).

celo transdoni ĝin al la direktoroj de la seminarioj. Fine, S-ro Ziegler sendis al la presagentejoj, senpere antaŭ la komenciĝo de la vojaĝo, taŭgan informon, kiu poste ekfektive aperis en multaj danaj gazetoj.

La vojaĝo mem komenciĝis lundon la 18-an de septembro, kiam per du aŭtomobiloj ni veturis al Haslev por fari la unuan prelegon en la tiea seminario. La urba ĉeflernejestro, S-ro Poul Hammer Jacobsen, estis tie por nin akcepti, la belega salono ankaŭ esti tie, sed ĝi estis absolute malplena: neniŭ alvenis. Montriĝis, ke pro grava eraro de la administracio neniŭ informis la studentojn pri la tago kaj horo de la prelego. Post iom da atendado restis neniŭ alia solvo ol fari prelegeton al la ĉeestantaj esperantistoj pri la kongreso en Harrogate kaj reveni al Kopenhago!

En la sekvintaj kvin tagoj la prelego okazis en jenaj porinstruistaj seminarioj: *Blågård* en Kopenhago, *Jonstrup* apud Kopenhago, *Ålborg*, *Hjørring*, *Ranum*, *Skive*, *Nissum*, *Silkeborg*, *Herning*, *Gjedved* kaj *Haderslev*. La nombro de gestudentoj variis inter 100 kaj 350, kaj tiu de la geinstruistoj, kiuj ĉeestis la prelegojn, inter 1 kaj 15. Plurloke ĉeestis la direktoroj. Entute la prelegojn aŭskultis pli ol 2100 gelernantoj kaj ĉirkaŭ 130 geinstruistoj. Krome trideko da esperantistoj, ĉar en kelkaj lokoj ili venis ĉu invitite (ekz. en Herning). ĉu hazarde troviĝis en la loko de la prelego (ekz. en Hjørring S-roj O.C. Lange, Frey kaj laboristomemlerninto). Plurfoje okazis, ke inter la instruistoj troviĝis iu, kiu sciis Esperanton, kvankam li estis neniel ligita al la Esperanto-organizaĵoj.

La interesiĝo estis vere grandega. La demandoj multnombraj kaj tre trafaj, tiel ke en la respondoj estis eble doni pliajn klarigojn kaj kompletigojn. S-ro Ziegler, kiu per sia aŭtomobileto veturigis min de loko al loko (entute pli ol 1200 kilometrojn en kvin tagoj), brile interpretis en la dana kaj tradukis la demandojn el la dana en Esperanton. Ankaŭ tiu flua kaj senĝena interpretado profun-

de impresis la aŭskultantojn. En kelkaj lokoj, ekz. en Herning kaj Silkeborg, ĉeestis ankaŭ la raportistoj de la lokaj gazetoj, kiuj tre korekte informis pri la prelegoj, la interesiĝo de la gelernantoj kaj, i.a., emfazis la altan nivelon de la traduko. Efektive, laŭ mia memoro, en neniŭ el la vizititaj seminarioj iu ajn venis eĉ al ideo demandi, ĉu oni povas paroli en Esperanto kaj ĉu ĝi estas vivanta lingvo! En pluraj seminarioj, kie estis sufiĉe da tempo je dispono, eĉ post la oficiala fermo de la aranĝo la instruistoj kaj gelernantoj longe restadis en la ejo, foliumis la ekspoziciitajn librojn, faradis pliajn demandojn. Multaj esprimis la deziro lerni la lingvon kaj jam dum la vojaĝo malfermiĝis novaj kursoj kaj klasoj.

En mia multjara laboro por Esperanto mi faris centojn da prelegoj en plej diversaj medioj de multaj landoj. Senhezite mi povas diri, ke neniam iu prelegvojaĝo estis tiel sukcesa, kiel la ĵus farita en Danlando. Al tio kontribuis pluraj faktoroj, el kiuj la ĉefaj estas: bona organizo kaj korekta, serioza informado de la gazetaro; tre homogena, klera publiko: edukistoj kaj estontaj edukistoj de la dana popolo; absoluta certeco, ke ĉio dirita en Esperanto estos adekvate reproduktita en la dana kaj inverse, dank' al la elstara talento de S-ro Sven Ziegler, mia pli juna kolego juristo.

La akcepto en la seminarioj estis tre afabla, kelkloke vere kora. Preskaŭ ĉie, depende de la disponebla tempo, la seminarioj regalis nin kaj ni pasigis plian tempon en vigla konversacio pri la temo.

Vizito al la Ministro

Post la finiĝo de la prelegvojaĝo mi estis akceptita de la nova Ministro de Edukado, Sinjoro K. Helveg Petersen. Same kiel la antaŭa, ankaŭ li eksplicite esprimis sian simpatian por la Internacia Lingvo kaj por la klopodoj vastigi la instruadon en la lernejoj. Mi havis la okazon informi lin pri la rezultoj de la vojaĝo, danki pro la subteno kaj gratuli pro la rimarkinde bonegaj kondiĉoj, en kiuj estas edukataj la estontaj instruistoj de Danlando. Dum la tuta konversacio la Ministro notis la ĉefajn punktojn. Mi pritraktis kun li tute principe ankaŭ la demandon de Interŝtata Konvencio kaj li promesis konsideri la aferon.

Antaŭ ol forlasi Danlandon, mi prelegis la 26-an de septembro al la membroj de ĉiuj kluboj en Kopenhago pri "La Perspektivoj de la Lerneja Kampanjo" kaj kompreneble informis ankaŭ pri la rezultoj de la prelegvojaĝo kaj pri miaj personaj impresoj ne nur rilate la altan nivelon de la vizititaj porinstruistaj seminarioj, sed ankaŭ la belegajn regionojn de tiu ĉarma kaj kultura lando, kiujn ni traveturis.

La sukceso en Danlando instigu al simila laboro en aliaj landoj!

Prof. D-ro Iro Lapenna

Dua kurso por geinstruistoj en Barlaston, Anglujo

Post la bela sukceso de la Intensa Kurso pri Esperanto, kiun Horace Barks, Jack Baggaley kaj Marjorie Boulton iom improvize kaj tute pionire aranĝis ĉe la Wedgwood Memorial College en septembro, 1960, la esperantistoj de Stoke-on-Trent senhezite aranĝis pli preparitan kaj imponan kurson por la semajno 23 —29a de julio, 1961. Tiu kurso, kvankam relative malgrandskala, ĉar la kolegio tiutempe havis lokon por nur 20 gekursanoj, plus multaj sporadaj vizitantoj, brile sukcesis pedagogie, kulture kaj propagande. La loka ĵurnalo presigis sian plej favoran raporton ĝis nun pri Esperanto kaj la kursanoj konfesis sin mirigitaj per la varieco, intereso kaj progreso dum la kurso.

Kursoj en Wedgwood Memorial College okazas sub la aŭspicioj de la lokaj klerigaj komitatoj, Universitato kaj Laborista Kleriga Asocio. La organizantoj venigis el Amsterdamo la docenton pri Esperanto ĉe la Universitato: Sigismundo Pragano, mondfama pro sia instruista talento, kunlaboris kun Marjorie Boulton por krei seriozan kurson. Denove Horace Barks, eksurbestro, Delegito de UEA, multe helpis; kaj la fidela, nelacigebla Jack Baggaley prizorgis cent praktikajn detalojn antaŭ kaj dum la kurso.

Gvidprincipo ĉe Barlaston estis, same kiel en 1960, ke lingvoinstruado ne sufiĉas por eduki esperantistojn; oni devas samtempe montri la utilecon, kulturan kaj interkomprenigan valoron de Esperanto. Fokuson de la kurso difinis la fakto, ke la gekursanoj estis plejparte geinstruistoj: prelegoj kaj diskutoj pri Instrumetodoj, Esperanto en la Lernejo, la Cseh-Metodo, Aŭdo-vidaj Helpiloj Pedagogiaj, Ekzamenoj, Lernolibroj, Legolibroj kaj Gazetoj, kune kun ekzemplaj sonbendoj pri Esperanto inter geknaboj kaj studentinoj, emfazis tiun flankon de la esperantista vivo. Intensa lingvoinstruado okupis multajn horojn kaj ofte eĉ salis la manĝojn: f-ino Boulton instruis la elementojn al novaj komencantoj, dum doc. Pragano, per diktaj, legaj kaj aliaj ekzercoj, poluris la lingvoscion de la progresantoj. (Iu mezaĝulino el la praganumitoj poste flustris al f-ino Boulton, ke ŝi neniam antaŭe spertis tiel bonan instruadon!)

Profesoro W. E. Collinson vojaĝis de Liverpool por fari unu prelegon elstare altnivelan: "Lingvisto Rigardas Esperanton". John C. Wells vizitis la kurson kiel reprezentanto de Junularo Esperantista Brita, kaj ankaŭ gvidis la gekursanojn tra Lichfield, kien ili ekskursis dum relative ripoza duontago. Dum festvespero, kiam la progresantoj prezentis simplan sed amuzan kaj aludoriĉan

koncerton, s-ino Hilda Melton alkondukis jugoslavajn geknabojn, kies vizito tre gajigis kaj stimulis la kursanojn.

La organiza kaj prepara laboro ŝajnis vasta, proporcie al la skalo de la kurso. Andreo Cseh speciale sendis legmaterialon kaj helpilojn; bendoj el Magnetofono-Servo de UEA havis tre valoran rolon; la lumbildoj pri Zamenhof, kiujn Marjorie Boulton uzis dum prelego, estis preparitaj ĉe la nova Foto-Servo de CED (organizanto, Henk Thien); granda estis la laboro por prezenti tutvesperan internacian programon de esperantaj filmoj; eĉ la rumana legacio en Londono helpis, sendante du belajn filmojn kiujn doc. Pragano uzis antaŭ sia speciala prelego pri Rumanujo alian vesperon. BEA sendis multajn librojn por la librobudo, kaj multajn librojn la kursanoj aĉetis. La ŝajne senproporcie vasta laboro tamen montris sin taŭga kaj utila; tiu kurso vere sukcesis kaj pruvis al multaj (ne nur al la ĉeestantoj, sed al diversaj ofte gravaj observantoj) la gravecon de Esperanto. Seriozaj literaturaj programoj, gajaj kantoj, lumbildoj, gramofondiskoj, ekspozicio, kontribuis al la konscio ke "Esperanto estas kulturo".

La Internaciaj Konkursoj 1961

Stato je la 30-a de septembro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2860	3260	113.99
2.	Finnlando	2515	2515	100.—
3.	Britujo	6688	6607	98.79
4.	Svedujo	6325	6055	95.73
5.	Usono	3660	3440	93.99
6.	Svislando	2120	1983	93.54
7.	Germanujo	7490	7005	93.52
8.	Belgujo	2121	1943	91.61
9.	Hispanujo	2585	2367	91.57
10.	Italujo	4247	3800	89.47
11.	Francujo	7516	6615	88.01
12.	Nederlando	5716	4922	86.11
13.	Norvegujo	1993	1647	82.64
14.	Jugoslavio	7150	5410	75.66
15.	Brazilo	5100	3737	73.27
16.	Danlando	3002	2178	72.55

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Novzelando	965	1119	115.96
2.	Israelo	250	285	114.—
3.	Kanado	665	746	112.18
4.	Aŭstralio	1146	1128	98.43
5.	Portugalujo	535	515	96.26
6.	Aŭstrujo	1580	1440	91.14
7.	Madagaskaro	250	205	82.—
8.	Islando	250	205	82.—
9.	Argentino	960	505	52.60
10.	Sudafriko	375	175	46.67
11.	Urugvajo	250	115	46.—



Doc. Pragano kaj Marjorie Boulton, instruistoj ĉe la kurso en Barlaston.

LA ESPERANTA LITERATURO DE JAN. 1954

ĜIS MAJO 1961

En la *British Esperantist* de 1954 p. 55 mi statistike enketis pri nia literaturo, kiel ĝi disvolviĝis en la postmilitaj jaroj; kaj jam tiam mi decidis kompili statistikon dum pliaj sep jaroj kaj kelkaj monatoj, por ke je la fino de tiu proksimume egala periodo mi povu observi la ritmon de nia literatura kreskado, kaj se ĝi montriĝos sufiĉe interesa, proponi la raporton al iu redaktoro. Tiu momento nun venis; kaj intertempe mi fariĝis mem redaktoro de *B.E.*, do supozeble povus sen tro da skrupuloj akcepti unu el miaj propraj kontribuoj. Tamen, dum la ordigado de mia manuskripto mi baldaŭ konsciiĝis, ke la riĉeco de la materialo kaj la graveco de la detaloj bezonas ne nur pli ampleksan pritraktadon, sed ankaŭ pli vastan forumon. Tiam aperis la interesa artikolo de S-ro S. Rosłonec pri la Problemo de la esperanta eldonado, kiu subite aktualigis la tutan aferon por la legantoj de *Esperanto*: kaj tial mi opiniis pli oportune, rezigni pri miaj redaktoraj rajtoj kaj proponi la enketon al la organo de U.E.A. Samtempe mi decidis prezenti la rezultojn de mia studado en

formo de sinoptika tabelo, kiu ebligas al ĉiu leganto trovi la statistikan detalon kiun li deziras, limigante mian tekston al la reliefigado de kelkaj deduktoj kaj la klarigado de miaj kriterioj.

Unue do jen la klarigo de miaj terminoj: *Romanoj* inkluzivas novelojn; sub Poezio falas *Junaĝa Verkaro* de Privat malgraŭ kelkaj paĝoj da prozo; *Aktualaĵo* estas verko pritraktanta iun ajn nuntempan socian aŭ politikan aferon, inkl. de biografio kiel de Tito aŭ de la misnomita *Ĉina Antologio*. *Esperantologio* ne inkluzivas la anglalingvajn verkojn, *The World Interlanguage* kaj la Boulton'an *Zamenhof*. Inter *Religioj* troviĝas Spiritismo. *Kulturo* estas ĉio, kio prezentas iun intelektan aktivecon, kiu ne apartenas al alia kolono, ekz. *Retoriko*. La teknikaj terminaroj, klasifikitaj sub *Scienco*, estas la solaj vortaroj enkalkulitaj; kaj kiam ili konsistigas parton de U.E.A.-jarlibro, nur la paĝoj de tiu parto aldoniĝas. Aliaj vortaroj kaj lernolibroj estas ignoritaj. En 1954 mi havis sektion de *Mondklasikaj Verkoj*. Tiu nun disdividiĝis inter romanoj, poezio, kaj dramoj; kaj la en-

Lando	Romanoj V. P.		Poezio V. P.		Aktualaj V. P.		Esp-logio V. P.		Religio V. P.		Dramo V. P.		Kulturo V. P.		Scienco V. P.	
1. Jugoslavio .	2	91	3	86	4	749	5	573		—	3	172	4	1050	3	185
2. Polujo . . .	3	1749	2	464	3	263	1	336		—		—	1	78		—
3. Britujo . .	1	224	8	1518		—	2	92	3	88	4	739		—	1	40
4. Francujo . .	3	560	1	400	1	16	1	452		—	1	291	2	305	2	218
5. Danujo . . .	3	446	3	285	4	220	1	45	5	528		—		—	2	369
6. Japanujo . .	4	209	3	529	7	287	6	618	3	94	1	42		—	1	20
7. Brazilo . . .	1	75	3	377		—		—	3	730	3	478		—		—
8. Esperantujo .		—	1	648		—	1	464		—		—		—	2	344
9. Bulgarujo . .	2	789	1	26	4	572		—		—		—		—		—
10. Ĉinujo . . .	1	150		—	3	716		—		—		—		—		—
11. N. Vjetnam .		—		—	6	910		—		—		—		—		—
12. Nederlando .		—		—	1	219	4	232	2	396		—		—		—
13. Hungarujo .	1	318	1	127		—		—		—	1	225		—		—
14. Germanujo .	1	140	1	96	1	72		—	1	40		—		—		—
15. Ĉeĥoslov. . .		—	2	284	1	86		—		—		—		—	2	143
16. Svisujo . . .		—	1	138		—	1	270		—		—		—		—
17. Svedujo . . .	1	32	1	112		—		—	1	32		—		—	1	120
18. Urugvajo . .		—		—		—		—		—		—	1	264		—
19. Norvegujo .	2	169		—		—		—		—		—		—		—
20. Belgujo . . .		—		—		—		—	7	249		—		—		—
21. Kanado . . .		—		—		—		—	1	60		—		—		—
22. Portugal. . .	1	215		—		—		—		—		—		—		—
23. Italujo . . .	1	79		—		—		—	2	80	1	47		—		—
24. Aŭstralio . .		—		—		—		—		—		—	1	200		—
25. Hispanujo .	1	39		—		—	1	88		—		—		—		—
26. Islando . . .		—	1	127		—		—		—		—		—		—
27. Usono		—		—		—		—	1	55		—		—	1	10
28. Aŭstrujo . .		—		—	1	63		—		—		—		—		—
29. Meksikio . .		—		—		—		—		—	1	15		—		—
30. N. Koreo . .		—		—	1	12		—		—		—		—		—
ENTUTE	28(58) V		32(15) V		37(11) V		23(15) V		29(23) V		15(9) V		9(34) V		15(11) V	
	5285 P		5217 P		4185 P		3170 P		2352 P		2009 P		1897 P		1449 P	
Originalaj . . .	9 (16)		19 (5)		2 (0)		21		5 (1)		6 (0)		7 (8)		10 (0)	
	31%		58%		5%		95%		17%		40%		77%		66%	

krampigitaj ciferoj indikantaj la sumojn de la unua periodo (en la du plej subaj linioj) estas alĝustigitaj laŭe. Grava difekto tie estis, ke mi citis nur librojn, ne la nombron de la paĝoj, tiel ke la nuna komparado ne povas esti kompleta.

Inter la landoj troviĝas Esperantujo pro kolektivaj verkoj kiel *Sciencaj Studoj*. Foje estis malfacile decidi, al kiu lando atribui verkon: ekz. *Virino ĉe la Landlimo* de M. Boulton, kvankam eldonita en Danujo, apartenas al Britujo kiel produktaĵo de brita cerbo; sed la *Biografio de Tito*, kvankam tradukita de Brito, estas alkalkulita al Jugoslavio, ĉar tiu lando komisiis la tradukadon al Brito tiam loĝanta tie.

Verkoj enhavantaj kàj originalajn kàj tradukitajn erojn estas metitaj inter la originalajn, se, kiel ĉe *Rozoj kaj Urtikoj* de Thorsen, ĉi tiuj plimultas.

Klarigo de la tabelo: De maldekstre dekstren prezentiĝas la 10 literaturaj specoj en malsuprenira ordo de paĝnombro, kiel estas montrite en la antaŭlasta horizonta linio. De supre malsupren prezentiĝas la 30 landoj en simila ordo, kiel montrite en la plej dekstra kolono. Ĉe ambaŭ listoj oni tuj rimarkos kiel erarige estus, juĝi nur laŭ la nombro de la libroj. Necesas atentigi, ke almenaŭ 3190 paĝoj devenas de represaĵoj, el kiuj la polaj klasikaĵoj liveras 1749 prozajn kaj 334 poeziajn.

Infanoj		Kantaroj		ENTUTE	
V.	P.	V.	P.	V.	P.
3	56	—	—	27	2962
—	—	1	48	11	2938
1	14	—	—	20	2715
—	—	—	—	11	2242
—	—	1	64	19	1957
2	80	1	64	28	1943
—	—	—	—	10	1660
—	—	—	—	4	1456
—	—	—	—	7	1387
1	82	—	—	5	948
—	—	—	—	6	910
—	—	—	—	7	847
—	—	—	—	3	670
—	—	2	184	6	532
—	—	—	—	5	513
—	—	—	—	2	408
—	—	1	64	5	360
—	—	—	—	1	264
—	—	1	87	3	256
—	—	—	—	7	249
4	168	—	—	5	228
—	—	—	—	1	215
—	—	—	—	4	206
—	—	—	—	1	200
—	—	—	—	2	127
—	—	—	—	1	127
—	—	—	—	2	65
—	—	—	—	1	63
—	—	—	—	1	15
—	—	—	—	1	12
11(6) V	7(2) V	206(184)	26,475		
400 P	511 P				
3 (3)	0	82 (33)			
27%		40%			

Sen tiuj paĝoj la unua loko apartenus al la poezio, - tre signifa fakto, aparte kiam 58% el tiu aktiveco estas originala. (Eble ĝi ja apartenas, ĉar el la dramoj 6 (3 originalaj) estas versaj). Sed ni enkalkulis la represaĵojn pro tio, ke nia baza celo estas, indiki la tutan agadon en la kampo de la libro: verkadon, presadon, eldonadon, kaj ankaŭ subvenciadon. Nur tiel oni povas ĝuste taksi la skalon de la Esperanta libro-industrio, — vastan relative al ĝiaj rimedoj.

La tabelo ebligas al ni plurajn konstatojn. Se ekzemple ni volas ekscii la diversajn kontribuojn de la landoj al ĉiu speco, ni povas grupigi jene (limigante nin al la unuaj ses lokoj en malsuprenira ordo):

Romanoj:	Pol, Bulg, Franc, Dan, Hung, Brit el 16 landoj
Poezio:	Brit, Esp, Jap, Pol, Franc, Braz el 15 landoj
Aktualaĵ:	N. Vjet, Jug, Ĉin, Bulg, Jap, Pol el 13 landoj
E-logio:	Jap, Jug, Esp, Franc, Pol, Svis el 10 landoj
Religio:	Braz, Dan, Ned, Belg, Jap, Brit el 11 landoj
Dramoj:	Brit, Braz, Franc, Hung, Jug, Ital el 8 landoj
Kulturo:	Jug, Franc, Urug, Aŭstral, Pol . . el 5 landoj
Scienco:	Dan, Esp, Franc, Jug, Ĉeĥ, Sved el 9 landoj
Infanoj:	Kan, Ĉin, Jap, Jug el 5 landoj
Kantaroj:	Germ, Norv, Dan kaj Jap kaj Sved el 6 landoj

Se ni volas scii la relativan multflankecon de la literatura produktado de la diversaj landoj, ni trovas la jenon: — Jap 9 specoj; Jug 8; Brit, Dan, Franc po 7; Pol 6; Germ 5; Braz 4; Bulg, Ĉeĥ, Ĉin, Esp, Hung, Ital, Ned po 3; Hisp, Kan, Norveg, Svis, Uson po 2; la aliaj po 1.

Oni devas tamen sin gardi, tro dedukti el la ciferoj. Religiaj verkoj ja mankas ĉe la komunistaj landoj; sed la sama nulo troviĝas ankaŭ ĉe kelkaj katolikaj landoj, kaj la 7 libretoj de Belgujo kaj la 5 libroj de Danujo ŝuldiĝas al po unu tre aktiva religia grupo. Simile la fakto ke la plimulto el la Aktualajaĵoj devenas el transkurtenaj landoj, signifas malpli ke tiuj landoj havas nevrurgiajn punktojn en sia politiko, ol ke iliaj registaroj havas la sagacon, uzi Esperanton por atingi tutmondan publikon. Ankaŭ la tre limigita signifo ĉi tie donita al Kulturo klarigas la grandan nombron da nuloj en tiu kolono.

Jen do la rikolto de 7½ jaroj da Esperanta eldonado: libro-kolekto, kiun ni rajtas nomi impona, kaj kiu (eĉ kiam nur proksimume 18% estas binditaj) farus honoron al kiu ajn privata biblioteko. Kaj kiam ni memoras la senĉesan fluon de literaturaj produktaĵoj en la gazetoj *Nica Literatura Revuo*, *Norda Prismo*, *Suda Stelo*, ni restas preskaŭ senspira antaŭ la laboremo de la verkistoj kaj la entreprenemo de la eldonistoj. Sed ĉio ĉi ne estus ebla sen la leganta publiko; ŝajnas do ke la malnova riproĉo farita al Esperantistoj, ke ili ne aĉetas librojn, ne estas plu valida. Ni esperu tion; kaj dume ni daŭrigu sur eĉ pli granda skalo nian apogon al verkantoj kaj eldonantoj, al ambaŭ kiuj Esperanto ŝuldas tiel nemezureble multon. Tiam, post aliaj sep jaroj, ni vidos kiel staras la nova tabelo.

D. B. Gregor

VĀŅA VLADIMIR

KIEL NI MORTIGADIS LEPORON POR LA ANTAŬKRISTNASKA VESPERMANĜO

Pasintjare je Kristnasko ricevis la patro de iu sia kolego en la oficejo vivan leporon. Ĉi tiun pliriĉigon de la antaŭkristnaska manĝokarto kvitancis la tuta familio kun dankemo — kompreneble, krom la avineto, kiu ĉiam opoziciis. Sed eĉ ŝi, vidante, ke ŝi estis de la familia konsilantaro voĉdone superita, eĉ ŝi submetis sin al ĉi tiu decido, kaj kiel persono sperta ŝi prenis sur sin la taskon organizi la tutan preparon de la leporo por la antaŭkristnaska vespermanĝo. Poste la avineto elserĉis en "La hejma konsilanto" la devizon "Leporo", kie estis skribite (paĝo 824): "Mortigado de la leporo — vidu la samon sub la devizo "Kuniklo". Ĉi tiu saĝa libro poste konsilis, ke "kuniklon, same kiel leporon ni ekprenos je malantaŭaj kruroj kaj mortigos per bato inter la orelojn" (paĝo 381). Post ĉi tiu grava konstato estis la taskoj dividitaj jene: la patro — mortigo de la leporo, la patrino — ĝia prilaboro. La frato Fabiano estis tenonta la leporon je kruroj. La avineto — kontrolo de la tuta procedo. La aveto estis destinita kiel unua, mi kiel dua rezervulo.

Poste do la afero komenciĝis. La patro suprenfaldis al si la manikojn, elprenis la leporon el kesteto kaj transdonis ĝin al la frato Fabiano, kiu — laŭ la konsilo — ekprenis ĝin je malantaŭaj kruroj. La patro dismetis la gambojn, trifoje profunde ekspiris kaj levis la manon, por doni al la leporo mortigan baton; sed subite la animalo ekkomprenis, ke la afero fariĝas grava — ĝi ekskuiĝis, kaj Fabiano kontraŭvole ĝin liberlasis. Anstataŭ la leporo ricevis la baton Fabiano; por la plua batalo li estis tiumaniere perdita.

La avineto (kaj samtempe estro de nia familio) kiel unua ekkomprenis la situacion kaj ekkuregis kontraŭ la leporo, kiu en senpripensa fuĝo zigzage kuregis tra la ĉambro. Bedaŭrinde, ŝia fulmorapida ago restis senefika, ĉar la leporo enkuris malantaŭ la ŝranko — kaj evidente ĉi tiu loko al ĝi ekplaĉis, ĉar ĝi ne montris multe da emo ĉi lokon forlasi. Intertempe rekonsciiĝis kaj organizis sin pluaj taĉmentoj, kaj post pli longa proklamo de la avineto, ke ŝi kontraŭstaris kaj avertis, kaj post mallonga familia interkonsento estis decidite la leporon elpeli kun helpo de balailo. Ĉi tiu ideo estis tuj realigita. La atendata rezulto ne venis, ĉar la leporo forkuradis antaŭ la balailo, sed ne forlasadis la lokon malantaŭ la ŝranko. La patrino alkuris kun brosbalailo, por helpi elpeli ĝin de la alia flanko. Ne vidante alian eblon, la leporo subrampis la ŝrankon, kaj ree komencis senpripense kuregi zigzage tra la ĉambro. En la batalon intermetis sin la patro; li ĵetegadis post la leporo kuir-tranĉilojn — sed li sukcesis nur frakasi la vitron en la fenestro, unu tranĉilon rompi kaj unu enigi en la pordon tiel profunden, ke ne estis eble ĝin eltiri. En ĉi tiu fazo de la batalo mi rangaltiĝis je unua rezervulo, ĉar mi nokaŭtis la aveton per viandpistilo.

Post plua horo de la batalo estis mallonga ripozo, kiun uzis ankaŭ la leporo. Ĝi estis en angulo, moke vidigis la dentojn kaj starsidis. Tion mi ne povis toleri, kaj tial mi ĵetegis post ĝi denove la viandpistilon; ĉi-tiufoje detruigis nur vitro de la libroŝranko. La batalo denove

komenciĝis kun ankoraŭ pli granda rapideco kaj vervo, sed montriĝis, ke ĉiuj disponeblaj bataliloj, t.e. balailo, brosbailo, resto da kuirtranĉiloj kaj viandpisto, ke ĉiuj tiuj rimedoj ne sufiĉas. Subite venis al mi savoporta ideo: mi enkuris la loĝeĉambron kaj alportis al la patro kuglopafilon, por ke li mortigu la leporon tiumaniere. La patro ekcelis, sed poste li ŝanĝis sian decidon kaj donis al mi kapofrapon; kaj kiam li ekvidis, ke la leporo intertempe enkuris la loĝeĉambron, ĉar mi lasis la pordon malfermita, mi ricevis ankoraŭ unu kapofrapon. Jes, tiel la mondo rekompencas!

La batalo transportiĝis en la loĝeĉambron, kio estis granda avantaĝo — por la leporo, kompreneble. Ĉi tie ĝi trovis multe pli da ebloj por defendo, kaj estas necese aldoni, ke ĝi uzis ilin rimarkinde. De tempo al tempo ĝi haltis kaj stariĝis la orelojn — sed tuj ĝi denove daŭrigis la vojon, ne permesante al ni respiri. La situacio estis senespera; la tempo senkompate pasis — estis jam la naŭa vespere, kaj ni ankoraŭ senĉese ĉaspeladis la leporon, kiu kontraŭstaris al sia fatalo kaj estis kuranta de unu angulo al la alia, entute malatentante, ke ĝi estas destinita al la antaŭkristnaska vespermanĝo. La patro intertempe rompis ĉiujn restantajn tranĉilojn, kaj komencis do ĵetegi post la leporo diversajn aĵojn, ekzemple paperpezilojn, cindruojn, ŝuojn kaj inkujojn; kelkajn el tiuj aĵoj li sukcesis detrui komplete, aliajn nur parte.

La persekutado denove ĉesis, ĉar estis necese solidigi la fortojn por plua, eble jam fine decidiga fazo de la batalo. La ĝisnuna stato de la batalo estis jena:

A. La leporo: viva kaj sana, perdoj: neniam

B. Nia familio:

1. hom-perdoj:

a. la frato Fabiano intertempe rekonsciiĝis — sed vidante, ke la batalo furiozas sur alia fronto (en la loĝeĉambro), li uzis la okazon kaj eltrinkis al la patro duonon de botelo kun sorpa likvoro. Post malebriiĝo li estos transdonita al la milita tribunalo. Por plua batalo — malkapabla.

b. la aveto ĝis nun ne rekonsciiĝis

2. material-perdoj:

a. du fenestroj kaj vitro de la libroŝranko frakasitaj, kvin kuir-tranĉiloj rompitaĵoj, entute aŭ parte detruitaj kvar cindruoj, du paperpeziloj, unu seĝo, unu brosbailo, unu fajrostango

b. pluaj perdoj: ĝenerala stato de ambaŭ ĉambroj: kaduka. Estas necese alvoki la ĉambropentriston, lakiston, tapetiston kaj mebliston.

Post rekomenco de la batalo plenumiĝis la sorto de dekduo da desert-teleroj, kiujn la avineto ĵetegadis post la leporo kiel diskon, plue detruigis la edziniĝ-dotaĵo de teleroj kaj supujoj de mia pa-

trino (mi piedpuŝetis — ĝis nun mi ne scias, kion — kaj detiris la tablotukon de sur la manĝopreparita tablo). La patrino faligis la kristnaskan arbeton, kiu brulnieniĝis. La batalo venis al sia kulmino. Laŭ ordono de estro de la ĉefa stabo (= la avineto) mi malfermis la pordon en la kuirejon. La leporo ne antaŭvidis ruzon kaj denove enkuris la manĝaj-preparejon — sed ho ve! La afero finiĝis tute alie, ol ni atendis. Nome, subite iu ekfrapetis sur la pordon, kaj antaŭ ol ni povis iel reagi, la pordo malfermiĝis kaj malkaŝis al niaj surprizitaj okuloj nian najbarinon, sinjorinon Nováčková. "Bonan vesperon, feliĉan kaj gajan Kristnaskon — kaj sanon, ĉefe la sanon, ĝi estas la plej grava", babilaĉis la najbarino en la pordo, eĉ iomete ne zorgante pri tio, ke la patro superŝutas ŝin per koleregaj rigardoj. Ni ĉiuj estis tiom surprizitaj per ŝia subita ekapero, ke ni ne estis kapablaj ekprotesti. Ankaŭ la leporo atenteme aŭskultis, sed vidante, ke ĉi tie ĝi ekscios nenion novan, ĝi uzis la okazon, ke la pordo restis malfermita, kaj definitive entombigis niajn esperojn pri sengrasa leporeto. La patro terure ekmalbenis, enfalis en la dialogon de la najbarino per ia stranga preĝo "Dio mia, pardonu al mi, ke mi ekbategos ĉi virinaĉon — sed forprenu al mi iom da forto, por ke mi ne ekbategu ŝin tro, ĉar alie oni povus min malliberigi", kaj poste ĵetiĝis kontraŭ sinjorinon Nováčková; sed ŝi antaŭvidis la danĝeron kaj fuĝis. Iam mi aŭdis, ke malkontentigita kolego povas malbone efiki je la sano; tial la patro — por eviti la eblajn sekvojn — donis al mi du kapofrapojn, ĉiujn ceterajn ekinsultis kaj foriris en restoracion, por tie vespermanĝi.

Jen, kiel ununura animalo povas detrui la trankvilon de la tuta familio! La patro forestas, la patrino ploras en la kuirejo, kaj la avineto prelegas al la kvar nudaj muroj pri tio, ke ŝi konsilis bone — sed neniu pri tio zorgis.

Intertempe rekonsciiĝis la aveto kaj la frato Fabiano — sed tro malfrue; tiel ili fariĝis nur atestantoj de la malglora fino de la batalo. Volante helpi mildigi la pezan familian atmosferon, Fabiano komencis elakvigadi malgrandajn fiŝetojn el la akvario de la patro — laŭdire por la solena vespermanĝo. Pro ĉi tiu neaŭdita kaj malpia ago kondamnis lin la aveto-juĝisto al batpuno. Fabiano kronis sian pledparolon per vortoj, ke li agis sub influo de alkoholo kaj pro la juneca senpripenseco — sed la aveto estis senindulga. Vortoj de la verdikto plenumiĝis, pro kio la avino pridonacis la plenumanton per la nomo "la maljuna kanajlo" — ĉar kulpas ne la bubo, sed la malbona edukmaniero. Malŝarginte sian koron, la avineto foriris al noktmeza meso, la aveto — en gastejon.

Ĉiuj foriris — kaj mi restu hejme? Ankaŭ mi forlasis la naskiĝdomon, por partopreni en nia ŝatata antaŭkristnaska ludo. Sciu, estis ĉe ni unu germandevena mokinda policano; li nomiĝis Friederiko Fric, sed ni principe kaj senescepte nomis lin "Zweimal Fric". *) Je kio li estis pli ridinda,

je tio li volis esti pli severa. Precipe li zorgis pri nokta trankvilo; li paŝis tra la stratoj, ĉiuvespere post la deka horo, antaŭkristnaske post la nokto-mezo, kaj atentis, ke neniŭ bruu kaj ke ĉiuj iru en ordo hejmen. Ni elpensis jenan ludon: ni diskuris tra la ĉefplaco, kaj subite unu el ni forte ekfajfis tra la fingroj. Zweimal Fric tuj kuris al li kaj serĉis la fajfilon (kiun, kompreneble, li trovis neniam); la akuzito malkonfesadis, mi ne fajfis — kaj subite aŭdiĝis fajfado el la kontraŭa flanko. Li do kuris tien, sed fajfsonoj senĉese antaŭ li forkuris. Konkludinte, ke ni pellacigis lin sufiĉe, ni kuniris sur antaŭe interkonsentita loko, per la tuta forto ekkriegis: "Zweimal Fric!", kaj poste ni disiris hejmen.

Mi do ĝojis, kiel Zweimal Fric ree estos kuranta tra la stratoj, sed ĉi-jare la ludo ne okazis — kaj mi tuj diros al vi, kial. Mi elkuris el la domo — kaj kion mi vidas? Zweimal Fric pelas tra la strato nian leporon! Renversita mondo! Leporoj kuras tra la stratoj — ĉu li, la ŝtata oficisto, povas tion toleri? Li devas ĝin elpeli el la urbo. Kion dirus al li alie liaj superuloj?

La leporo kuras sur la trotuaron, zigzagas, nun estas sur la ŝoseo — sed la policano ne laciĝas kaj sekvas ĝin kaptoproksime. Sed — kapti ĝin? Senŝenĉaĵo! De maldekstre ruliĝas ŝarg-aŭtomobilo, de dekstre ankaŭ: la haltigiloj ekgrincas, tintas vitro, ekkrio — sed la leporo elkuras viva kaj sana, kaj post ĝi — Zweimal Fric. Dank' al Dio, okazis nenio, ankaŭ ambaŭ ŝoforoj ĝustatempe elsaltis, sed la aŭtomobilojn riparos neniŭ plu.

La leporo daŭrigas, Zweimal Fric ĝin postsekvas. Kontraŭ ili paŝas avo kun bastono en la mano. La leporo enkuras al li sub la piedojn, la

majunulo perdas la ekvilibron, falas kaj en instinkto de memsavo eksvingas la bastonon, kiu trovas kiel celon la polican kaskon kaj surkapigas ĝin al Zweimal Fric ĝis la oreloj. La persekutado finiĝas — la leporo venkas kaj fuĝas, senĉese fuĝas for el la urbo. Ankoraŭ foje ĝi kaŭzas karambolon — ĉi-tiufoje de kvar aŭtomobiloj kaj unu motociklo — sed fine ĝi atingas la sopiratan arbar-randon kaj malaperas.

Zweimal Fric versimile vidis, ke la leporo elkuris el nia domo, kaj nia najbarino certe volonte al li sciigis, al kiu la leporo apartenis; alie mi ne scias klarigi al mi la fakton, kial la sekvantan tagon ekfrapis du policistoj senhezite ĝuste sur nian pordon. La patro ilin elĵetis, ekinsultis la najbarinon kaj eltrinkis reston da sorpa likvoro. Poste lia rimeno ekdancis sur certa korpoparto de la frato Fabiano, por ke li memoru, ke alkoholaĵo ne estas taŭga trinkaĵo por infanoj — kaj kvankam mi eltrinkis nenion, ankaŭ mi havis la okazon gajni spertojn, ĉu la batregaligo per rimeno estas agrabla.

Necesas aldoni, ke la patron oni juĝos pro ofendo de ŝtata oficisto kaj ke li devas aĉeti al la policano Zweimal Fric novan kaskon. La patrino senĉese ploras. La avineto forloĝiĝis, la aveto pasigas la tutajn tagojn en gastejo. La frato Fabiano forkuris el la hejmo, kaj mi malsukcesos en naturscienco. Krome oni klasifikos miajn morojn kiel "ankoraŭ malkontentigajn", ĉar mi estas aroganta. Diris al mi tion la instruisto, ĉar al lia demando, kion mi scias pri leporo, mi respondis "nenion", kaj poste mi rakontis al li ĉi tiun historieton.

*) *germana vorto "zweimal" signifas en esp. traduko "duoble".*



Alvaro de Orriols:

La Akcidento

Branĉo :

Originala poezio

Unua Premio

Tron, tron,
tron, tron,
tron, tron.
tron, tron,
la radostangoj
puŝas en rond',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
ire reve ne
kaj kun sinkron',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
dum radoj giras
kun raŭka son',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron.

Boras orelojn
la ferumado,
tra l' puliaro
venas l' ordon'.
La stangoj puŝas
ĉiam en rond',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron.

Radoj mildentaj
kaj turbulentaj
intermordiĝas
sur brua fon',
ĉiam girante,
ĉiam girante,
ĉiam girante,
kun raŭka son',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron.

Laboro sprona
kaj monotona.
La aksoj knaras
kun voĉ' flutsona.
Kusenoj brulas
en varma dron'.


La radostangoj
puŝas en rond',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron.

La ferumado
ŝajnas veado
de monstra besto
aŭ de ciklon',
kaj kun elano
de Levjatano
radoj turniĝas
kun raŭka son',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron.

Subita krio :

Kurta cirkvito!!... Saltas pulio.
Halto brutala. Angora pelo.
Inter la radoj, ve!, polĉinelo
montras sin mola, pala, rompita,
per feraj dentoj sange kroĉita.
Antaŭ momento
li laboradis kun diligento,
kaj nun senviva kuŝas! Mizero!
Alkuras ĉiuj kun senespero,
aŭdiĝas ploroj, sonas fajfiloj,
voĉoj ordonas, agas leviloj,
kaj fine iu, kun kora tremo,
tiras la korpon el la radpremo.
Sed jam malfrue!... Ludis la Sorto
kaj en la ludo gajnis la Morto,
kies inertan predon, kun timo,
kunuloj portas ĝis la pavimo.
Jen la brankardo, la nigraj drapoj,
kapojn malkovras funebre l' ĉapoj,
ĉesas labor' en drama etoso,
haltas maŝinoj, mutas amboso,
torniloj dormas. Estas l' ordon'!

Sed morgaŭ, nepre, ĉe l' frumateno,
—la vivo estas frida kateno!—,
ree komencos marŝi la ĉeno,
kaj la radaksoj giros en rond',
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron,
tron, tron...



Unuo premio : Sen titolo. Tadeusz Kowalski

FOTO-EKSPOZICIO "LA HOMARO" (Harrogate 1961)


LA PREMIITAJ VERKOJ

Ĉi-kune ni reproduktas la premiitajn verkojn de la Foto-Ekspozicio "La homaro", kiu okazis en la kadro de la Unua Arta Festivalo, Harrogate, 1961. Krome ricevis honoran mencion tri verkoj, kiujn ni esperas publikigi en venontaj numeroj de la revuo. Ili estis :

William Auld : "Estonteco".

Marek Stawiarski : "Meditado".

Tibor Sekelj : "Ajnu ceremonio".



Dua premio : Je aŭroro kapoj falos. Tibor Sekelj



Tria premio : Kiel vi fartas? Tadeusz Kowalski

Novaj Libroj

Duope ricevitaĵoj ni recenzas; unuope ricevitaĵoj ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

OTELLO, LA MAŬRO DE VENECIO* de William Shakespeare. El la angla lingvo tradukis Reto Rossetti. Eldonis J. Régulo Perez, La Laguna. 207 p. 22 × 16 cm. broŝ. Prezo: 6,70 gld. (26,80 st.).

La dek-tria verko en la Stafetoserio konigas al ni la mondfaman dramon *Otello* de Shakespeare en brila poezia traduko. En sia nuna, eldonita formo, la traduko tamen ne estas tiu, kiun oni prezentis sur la scenejo dum la Skota Kongreso en la jaro 1951, ĉar de tiam ĝi estas ankoraŭ dufoje tralaborita.

Kiel estas skribite en la enkondukaj vortoj sur la kovrilo, ĉi tiu klasika tragedio havas nun por multaj homoj tute specialan kaj aktualan intereson, pro la akreco de la interrasaj konfliktoj kiujn oni travivas en diversaj mondpartoj. La apero de la traduko estas aktuala ankaŭ speciale por la esperantista publiko, pro la ĵusa diskuto — publikigita sur la paĝoj de la revuo *Esperanto* mem — pri la relativa valoro de la literaturaĵoj originalaj kaj tradukaj.

Ĉar la profesiaj anglalingvaj redaktistoj kaj komentistoj tute ne konsentas inter si pri tio, kio el la tri diferencaj unuaj eldonoj de la dramo estas la plej fidinda fonto por moderna reeldono, kaj ĉar ili ankaŭ tute ne samopiniis pri la veraj signifoj de multaj vortoj kaj frazoj en la originalaj tekstoj, tial ne estas profitdone al la leganto de nefaka revuo, ke recenzisto tre detale diskutu la tekston, kiun Rossetti liveris al ni. Cetere, el vidpunkto rigora, nur tiu, kiu dediĉis al ĝia pristudo tiom da tempo, kiom la tradukinto mem donis, rajtus serioze kritiki la laboron. Mi volus, tamen, menciigi ĉi tie kelkajn punktojn, kiuj min frapis dum la legado: — p. 28, 1.6/5 m. ... *mi la koron portas/sur la kravato* ... La angla teksto havas anstataŭ *kravato* la vorton *maniko*. Eble Rossetti, opiniante la esprimon ne internacie komprenebla, pensis ĝin pliklarigi per la ŝanĝo. p. 35, 1.7. *Du-tri fojojn* tekstis originale *naŭ-dek fojojn*. Ĉi tie oni povus supozi, ke la ŝanĝon instigis la dusenceco de *naŭ-dek* kiam la vortoj estas deklamataj, sed se la motivo estis ĉi tia, kial Rossetti ne elektis, ekzemple, *ok-naŭ*, kiu estus almenaŭ pli proksima al la originalo? p. 45, 1.13m.

Kial dekjaran staras anstataŭ *sepjaran*? p. 58, 19. *merlo* (angle: *black-bird*) tute ne transdonas la nuanco de la angla vorto *snipe*, kiu — kvankam ĝi strikte signifas *galinago* — tamen havas ankaŭ figuran sencon: *trompito*. p. 69, 1.13 ... *negoci la bieron* ŝajne indikas miskomprenon de la angla frazo ... *chronicle small beer*, kies vera signifo estas *kroniki bagatelojn*. p. 73, 1.11 *indekso* ŝajnus pli taŭga ol *indiko*.

Multfoje oni rimarkas lokojn, kie Rossetti evitis traduki laŭvorte, pro evidenta teknika kialo; tre klara ekzemplo troviĝas sur p. 69, 1.8/9; *pasero* — *ansero* anstataŭ *moruo* — *salmo*. Tiaj ŝanĝoj estas neeviteblaj ĉe konscienca traduko de poezio, kaj ĝenerale ili estas tre lerte faritaj en ĉi tiu verko.

Troviĝas pluraj notoj de la tradukinto pri eblaj alternativaj interpretoj de la angla teksto; en aliaj lokoj oni trovas helpajn klarigojn pri klasikaj kaj aliaj aludoj.

La noto sur p. 41 pri la ĝenerala uzo de la formo *DOGHO* anstataŭ *DOĜO* (pro manko de la supersignita majuskla litero ĉe la presejo) devus aperi jam sur p.23, kie oni unufoje renkontas tiun formon strangan por niaj okuloj. La postkorekto sur p. 207 pri la zamenhofa senco de *agiti* devus menciigi ankaŭ trian uzon de tiu vorto, nome sur p. 148, 1. 2. Estas malkonsilinde uzi kioma (p.43, 1. 4) en senco kvanta. Plurloke Rossetti tradukas la anglan *woo* per *svati*, kvankam laŭ PVS kaj laŭ mia sperto ĉi tiu vorto ne havas tiun signifon; sendube ĝia oportuna mallongeco motivis ĝian uzon. Anstataŭ *koncedi* (p. 72, 163, kaj aliloke), kiu mankas en PV, sed kiu estas trovebla en la angla-esperanta vortaro de Fulcher kaj Long, estus preferinda *allasi*, *akcepti* aŭ *konfesi*, laŭ la kunteksto.

La legado ne opiniu, ke per la ĉi-supraj kritikoj mi volus indiki, ke la traduko estas nebona — ilia relativa malmulteco ĉe tiel longa kaj malfacila verko ja pruvas la altan kvaliton de la laboro farita kaj refarita de Rossetti: laboro donanta al internacia legantaro la eblon konatiĝi kun ĉi tiu majstroverko de la angla dramisto pere de interpreto farita de moderna anglalingvano. Necesas aldoni,


cetere, ke ankaŭ ni britoj legos la tradukon kun intereso kaj profito, tial ke ĝi helpas prilumi por la nuntempulo multajn neklarajn partojn de la originalo. La verko estas certe nemalhavebla por ĉiuj amatoroj de la literaturo angla kaj de la literaturo esperanta.

Alec Venture

Daily Mail BILDLIBRO PRI BESTOJ. Esperantigis W. A. Gething, kun helpo de C.D.A. Capp kaj M. C. Butler. Eldonis ("Daily Mail" (Associated Newspapers Ltd.,) Londono, 1961. 72p. 33.5 × 26 cm. Prezo: 8,— gld. (32 steloj).

En epoko de belaj libroj en Esperanto, jen unu el la plej belaj, kiu estas krome unu el la tre utilaj. Ĝi estas grandformata libro pri la bestoj ĉiaspecaj, kaj, kvankam sendube ĝi unuavice celis pliaĝajn infanojn, tamen mi konfesas, ke bezonon de ĝuste tia libro mi sentis, kaj iom urĝe sentis, jam de multaj jaroj. Tiom mi sentis la bezonon, ke plurfoje mi klopodis, sen granda sukceso, krei hejme kaj private similan libron, eltranĉante bildojn de bestoj kaj sube skribante la nomojn en Esperanto. Tro sporade, tro nesperte. Mi estas en neniuj senco sperta pri bestoj, kaj mi konsciis, ke en mia kompatinda kapo regas konfuzo kiam temas pri ili. Mi konas en Esperanto la nomojn de iuj bestoj; mi konas en angla lingvo la nomojn de iuj bestoj; kelkfoje mi scias traduki la nomojn el unu lingvo en alian. Sed vere, kiom utilas scii ke "svelta loriso" estas "slender loris", se mi ne scias samtempe, ĉu la besto havas naĝilojn aŭ piedojn aŭ voston aŭ rampas aŭ grimpas aŭ naĝas? (Kaj ne nur pri bestoj: mi uzas senĝene la vorton "ulmo" en tri lingvoj, sed metu min en arbaron kaj mi ne scios distingi la objekton disde la aliaj arboj). Sed eĉ se vi estas malpli senscia ol mi, mi estas certa, ke vi trovos interesa kaj instrua tiun ĉi libron, ĉar, kvankam "simpla", ĝi estas tamen tre informa kaj ampleksa. Kaj la multaj ilustraĵoj — ili estas ĉiuj koloraj — estas belaj, allogaj kaj... instruaj. Krom tio, la informoj pri ĉiuj bestoj estas vere interesaj. Troviĝas apartaj sekcioj pri Primatoj, Insektmanĝantoj, Karnomanĝantoj, Ronĝuloj, Elefantoj, Hufuloj, Sendentuloj, Vespertoj, Mar-mamuloj, Marsupiuloj, Birdoj, Reptilioj, Amfibioj, Fiŝoj, Insektoj, Moluskoj, ktp. Oni amplekse pritraktas la tutan Regnon de la Animaloj. Mi estas certa, ke ne ekzistas esperantisto, kiu ne ĝuos tralegon de tiu ĉi libro, kaj kiu ne foliumos ĝin kun la plej profunda plezuro.

La eldoninto estas unu el la plej grandaj gazetoj de Britujo, kaj ilia redakcio estas dankinda kaj gratulinda. La preparadon de tiu ĉi libro ili entreprenis "kiel eksperimenton kaj ĉar ni sentas simpatian al la prin-



cipoj de Esperanto. Se ni konstatos, ke oni sufiĉe kontentige aĉetas ĉi tiujn librojn — ĉar ili jam anoncis pretigadon de dua bildlibro en Esperanto, kun titolo "Amuzo per Scienco" — "ni ricevos instigon eldoni ankoraŭ pluajn". Al mi la prezo ŝajnas sufiĉe modesta, egala al simila libro en angla lingvo; ĉiuokaze vi ne bedaŭros se vi pagos ĝin por havigi al vi tiel elstaran eldonaĵon. Kiam granda neesperantista eldonejo eldonas libron en nia lingvo ni evidente deziras subteni ĝin; ĉifoje ĝi senrezerve meritas nian subtenon pro la kvalito de la proponata varo.

W. Auld

505 ELEKTITAJ POEMOJ EL MANNJO-ŜUU*. *El la japana trad. K. Ossaka. Eld. Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1958. 212p. 19 × 13.5. Prezo: bind. 9.60 gld. (38.40 steloj); broŝ. 6.60 gld. (26.40 steloj).*

"Ni kaj la ceteraj": ŝajnas, ke japanoj diras tion kun nedifinebla duonrideto, en kiu miksiĝas kune indulga senpacienco por la "ceteraj", kaj tima ĵaluzo de persono, kiu scias, ke li posedas trezoron, kaj hezitas konfidi ĝin, eĉ vidigi ĝin al "la ceteraj".

Kaj la "ceteraj" scivolas: "Ni kaj ili". Ni avidas penetri, kompreni tiun civilizon unikan, disvolviĝintan aparte, preskaŭ senkontakte, dum tiom da jarcentoj ĝis antaŭ ne multe.

Jen do Kenĵi Ossaka, la 70-jara tradukinto de "Mannjo-Ŝuu" (Miriado de folioj), venas al ni kun tiu donaco, delikata kiel ĉeriz-floro. En lia saĝa, trankvila, serioza aspekto ni kredas rekoni lian landon, kiu proksimiĝas al tiu ĉi nia furioza, bruema, mortiga civilizo, turnante al ni sian maljunan, multspertan vizaĝon. Legante la libron, oni sentas tute malsame ol legante iun ajn poezi-libron. "Ili" — kion pensis, kiel suferis, kiel amis, kiel alrigardis la mondon "ili". Kiel "ili" parolas, kiel "ili" poetas. Kiel (en ĉi tiu libro) "ili" esprimis ĉi-ĉion antaŭ mil tricent jaroj, kiam "ni" an-

koraŭ baraktis en mezepoka mallumo. S-ro Ossaka, en antaŭparolo kies vortoj estas pesitaj kaj elektitaj kun speciala inteligenta rigardo al la "ceteraj", al "ni" ne japanoj, akcentas, ke japana poezio ne priskribas, sed aludas; kaj, ke, eble, el tiu aludado, el tiu esprimita penso kiu staras centre de sinsekvo de nediritaj, ne vorttradukitaj pensoj, el tiu kristaliĝo de konfuza sentaro ĉirkaŭ nur unu bildo, aŭ ĉirkaŭ nur unu precize perceptebla sento, aŭ ĉirkaŭ nur unu klare formiĝinta ideo, "ni la ceteraj" ne komprenos, ne kaptos tion, kion "ili la japanoj" kapablas; kutimas ĝui: tute samkiel por nia okcidenta orelo ne estas plene perceptebla japana metriko, kiun li tre efike kaj hele resumas. Li ne pravus. Vasta bildaro precesias, de unu al alia "tanka": mi vidis, mi vidis la imperiestrojn kun sia sekvantaro, princoj kaj paĝioj, grandsinjorinoj kaj poetoj, trairi montojn aŭtune ruĝajn, aŭ printempe vestitajn per miloj da floroj; mi aŭskultis la batadon de maro ŝaŭmanta, la kukolon inter la branĉoj, la malrapidan plaŭdadon de lagaj akvoj; mi kunploris edzojn perditajn, edzinojn sole kuŝantajn, malproksimecon de geamantoj, foreston de infanoj. Mi retrovis sentojn kiuj estis miaj: ili suprenvenis el mia subkonscio, vokataj de tiuj fuĝantaj imagoj; mi ĝuis profunde, ne la versojn mem, sed tion, kion la versoj vekis en mi.

Legu la libron en silento kaj trankvilo. Paŭzu longe post ĉiu poemeto: lasu, ke io formiĝu en vi. Viaj pensoj plilarĝiĝos senbrue, senvorte, kiel cirklaj ondetoj post falo de ŝtono en akvon senmovan. Kaj tiam danku s-on Ossakan, pro la neestimebla spirita donaco kiun li faris al ni. Kaj tiam meditu pri "ili" kaj "ni", pri nia civilizo kaj la ilia. Vi emos demandi al "ili" ĉu valoris, ho ĉu valoris la peno konatiĝi kun tiu ĉi nia senspiriga vivmaniero, enmiksiĝi en niajn stultajn luktojn, akcepti okcidenton..

Car, ve, Oriento signifas sunleviĝo, kaj Okcidento sunsubiro.

C.C.G.

LA KOLEKTANTO INTERNACIA. Eldonis Jugoslavia Esperanto-Ligo. 28-paĝa monata filatela revuo. Jara-bono 2,5 \$ aŭ egalvaloro.

La 15an de julio aperis la unua numero de tiu ĉi plaĉaspekta organo por ĉiuj esperantistoj-filatelistoj. La revuo entenas ĉion interesan kaj necesan por la filatelistoj. Estas aktualaj artikoloj, informoj, novaj emisioj, eldonkvantoj kaj anoncoj pri interŝanĝo, oferto kaj aĉeto. Krome la revuo servas ankaŭ por glumark-kolektantoj. Multaj bildigoj ilustras tiun ĉi novan fakrevuon, kiu nepre meritas subtenon de niaj multaj filatelistoj. La unua numero enhavas tre interesan artikolon: "Esperanto sur Poŝtmarkoj". Lingvaĵo bonega. Adreso: "Esperanto-Ligo", Poŝtfako 239, Ljubljana, Jugoslavio.

P. Z.

MALSATA STONO*. Kolekto da rakontoj de Rabindranath Tagore. Tradukis el la bengala lingvo Lakshmiswar Sinha. (Eldona Societo Esperanto, Malmö) Serio Oriento-Okcidento, n-ro 1. 128 paĝoj. Broŝ. 8,50 gld. (34 st.), bind. 11,50 gld (46 st.)

Unu el la problemoj antaŭ la nuntempa mondo estas la interkompreno inter la oriento kaj la okcidento. La okcidento ĉiam pli unuigas, posedante komunan kulturheredaĵon; pri la kulturo de la oriento ni en la okcidento konas preskaŭ nenion: la oriento pli bone komprenas nin, sed tute ne sufiĉe. Do ni tre bonvenigas ĉi tiun librosieron kiu klopodas konigi reciproke la du kulturojn kaj popolojn.

Kiel D-ro Lapenna klarigas en sia enkonduko, UNESKO deziras plifortigi la interkompreniĝon inter la popoloj de la Oriento kaj Okcidento; UEA decidis apogi UNESKO'n per la eldono de ĉi tiu aparta serio de literaturaj verkoj. Venontaj libroj estos samformataj kaj estos eldonitaj de diversaj presoj: ni esperas, ke ili ĉiuj atingos la altan nivelon laŭ papero kaj presado de ĉi tiu unua volumo. Tre interesa estas la elekto de Rabindranath Tagore, kies naskiĝo okazis antaŭ unu jarcento. Filozofo kaj poeto, li verkis multon pri la hinda vivo kaj la hinda spirito — sed ankaŭ pri la homa spirito. La enkonduka eseo de la tradukinto pri la vivo kaj verko de Tagore estas tre valora parto de la libro. Plue, mi deziras rimarki la fluan kaj bonegan tradukaĵon de S-ro Sinha. Gravus, ke ĝin faris el la bengala, hindo kies propra lingvo estas la bengala — do la oriento parolas al la okcidento rekte, kaj ne nur pere de okcidentuloj aŭ de orientulo uzanta lingvon okcidentan.

La rakontoj, do, havas multajn interesojn por ni; sed finfine la legantoj juĝos ilin kiel rakontojn, kaj el

tiu vidpunkto ili certe estas kaj interesaj kaj legindaj. El la sep noveloj, du estas fantazioj — pri palaceto kies muroj estas malsataj, kaj pri fantoma korpo kiu serĉas sian skeleton; kelkaj posedas la ecojn de antikvaj legendoj, ekzemple "malespero", pri princino kiu serĉas tra la tuta lando sian amaton; aliaj temas pri fortaj homaj emocioj, pri amo aŭ ĵaluzo — ekzemple la amo de la maljuna servisto en "La Reveno de Khoka-babu",

kies lojaleco al lia estro tiom grandas, ke li fordonas sian filon; aŭ la patreca amo de la fremdulo el la foraj montoj de Kabulo al kvinjarulino.

Ili tenas bone la atenton de la leganto: foje ili estas iom naivaj, eĉ foje iom sentimentalaj, sed tra ili ĉiam troviĝas forta fadeno de kompato kaj kompreno, eble pli memorige esprimita en "Kabuliwala", la viro el Kabulo.

(Mi rimarkis nur du preserarojn: p 9, "orginalo" anstataŭ "originalo",

kaj p. 118, "deveni" anstataŭ "diveni". Plue, la konstruo kaj interpunktado de la antaŭlasta frazo sur p 106 ŝajne devas esti: "Tarapado konsideris la demandon tute sensenca, kaj rideteme respondis....")

Ci tiu volumo, kun naŭ ilustraĵoj de la hinda artisto Sukhamoy Mitra, estas tre sukcesa enkonduko al la nova serio, kaj mi povas varme rekomendi ĝin, ĉar ĝi meritas multajn legantojn. W. J. Nesbitt.

NIA FORUMO

"ĈU NI VERE BEZONAS LITERATURON?"

Mi estas inĝeniero kaj jam antaŭ 35 jaroj en la lernejo mi elektis tiun profesion. Tamen en la lernejo estis klera instruisto pri mia nacia lingvo, la angla, kaj al tiu viro mi ŝuldas mian ŝaton al la literaturo; mi preskaŭ adoris lin kaj lian konsilon mi akceptis kiel dian diradon. Iun tagon alia knabo en la klaso petis informon pri Esperanto kaj mia amata instruisto forte kondamnis la lingvon, ĝuste pro tio ke ĝi ne havas literaturon. Li parolis sincere laŭ sia propra konvinko kaj el tio restadis mia kredemeco dum pli ol 15 jaroj. Dum tiuj jaroj mia sintenado al Esperanto estis kontraŭa pro mia antaŭjuĝo estiĝinta per sola frazo de unuopulo, sed grade kaj treege skeptike mi komencis esplori la pretendojn de la "senliteratura" lingvo. Mi eltrovis ke dum tiom da jaroj mi estis izolita ekster rava literaturo, kies enirejo estis barita de nescio.

"Songe sub pomarbo" vere estas majstra verkaĵo kiu enhavas la tutan trezoron pri homaj aspiroj, sopiroj kaj kondutoj, nenion novan tamen ĉion valorem. La aŭtoro prezentis al ni la eternan veron per nova kaj unika rimedo. La fanfarono de Kazimiro kiu vante taksas sian posedaĵon kiel taŭgan anstataŭaĵon de homaj sentoj; la senhomeco de la rolantoj Abo, Azo, Noza, Qu kaj Pi efike kontrastas al la viveco de la geamantoj; la skeleta danco de la morto estas ne nur impona spektaklo sed ankaŭ ĝi montras al ni danĝeron kiun minacas la kredo al malespero.

Antaŭ du monatoj mi renkontis bone edukitan sinjorinon kaj ni priparolis pri Esperanto. Ŝi fine diris, "la celo kaj la idealo de Esperanto estas bonaj sed ĝi ne havas literaturon". Tiel esprimiĝis la sama eraro kiu min trafis antaŭ 35 jaroj. Ni, la esperantistoj, ja bezonas literaturon kiel esprimilon de nia kultura vivado internacia. sed eĉ

plie bezonas ĝin la ne-esperantistoj por kiuj ĝi estas ĝusta kaj ne kontraŭstarebla konvinkilo pri ilia malpraveco.

Al mia instruisto mi ŝuldas ankoraŭ pro mia ŝatemo al literaturo sed mi multe domaĝas la perditajn jarojn kiam mi vegetis "Songe sub eraro."

K. Mc. Lennan

ĈU LEGAS AŬ NE LA ESPERANTISTARO?

Bedaŭrinde, la politikaj okazintaĵoj dividis la mondon je du partoj, kaj ĉi tiu cirkonstanco malhelpas la transpagon de la mono el unu parto al la alia, sekve same malhelpas aŭ almenaŭ malfaciligas la libroaĉetadon. En mia lando la Ŝtata Librovendeja Entrepreno estas rajtigata pri la importado de libroj. Je mia interesiĝo pri libroimporto el okcidentaj landoj, la Entrepreno la 12-an de junio 1961 respondis, ke ĝia okcidenta valutokvanto jam estas elĉerpita, do mi povos mendi nur el Orient-Germanio aŭ aliaj popoldemokratioj. Ĉi tiu respondo tute klarigas ke ni hungaroj kial ne povas aĉeti la Esp. verkojn eldonitajn en okcidentaj landoj, inter ili ekz. la librojn de la hungara Julio Baghy, Ferenc Szilágyi, Sándor Szathmári. Mi pensas, ke tute sama estas la situacio ankaŭ en Ĉeĥoslovakio, Bulgario, Rumanio, Pollando kaj verŝajne en Jugoslavio.

Sed kial ne aĉetas librojn en pli granda kvanto niaj samideanoj vivantaj en la okcidentaj landoj? Kial estas troveblaj en librobutoj la verkoj de famekonataj verkistoj ankoraŭ 2—3 jarojn post la eldono? Eble la verkoj estas tre multekostaj? Tre mi ŝatus legi la respondon de la okcidentaj esperantistoj!

Sed ni, la loĝantoj de la popoldemokratioj, ĉu ni aĉetas el aliaj orientaj landoj, de kie ni povus mendi per niaj entreprenoj? Antaŭ kelkaj monatoj mi interesiĝis pri io ĉe la administracio de la "Geografia Revuo" (Ljubljana, Jugoslavio). Tre surpriziĝinte mi legis la respondon en kiu la administracio informis min — inter-

alie — ke ĝi sendis 6 (ses!!!) ekzemplerojn de la verko "Sekretoj de la marestaĵoj" de Petar Giunio al la Entrepreno "Jugoslovenska Knjiga" Beograd, (ĉi tiu estas la jugoslava librovendeja entrepreno por eksterlando), sed ĝis la 18-a de junio 1961, la dato de la letero, neniuj mendis nek el Hungarlando nek el aliaj popoldemokratiaj landoj! Estas karakterize, ke la samideanoj en Jugoslavio sendis al sia librovendejo nur ses ekzemplerojn por eksterlanda vendado, kaj tiuj libroj tie polvopleniĝas sur la bretoj! Ĉi tiu eksterdube signifas ke ni ne eluzas niajn eblecojn, kvankvam troviĝas multe da aĉetindaj libroj ankaŭ en la popoldemokratiaj landoj. Se iu volas elekti el inter la politikaj kaj propagandaj broŝuroj kiel ekzemple "Vivu leninismo", "Pri praktiko" kaj "Pri popoldemokratia diktaturo" el Ĉinio "Surtera infero", "La vivo de Ho-Chi-Minh" kaj "La demokratia respubliko de Vietnamio" el Vietnamio, tiu facile povas elekti. Krom tiuj tendencaj verkoj troviĝas ankaŭ multaj literaturaj kaj sciencaj verkoj, kiuj estas aĉetindaj eĉ aĉetendaj. Mi mencias nur la verkojn "La Faraono", "Quo vadis", "Sinjoro Tadeo" el Pollando, "Bofilino", "Vagabondo" kaj "Tra la ventego" el Bulgario, plue "Kvar prelegoj pri Esperanto", "Tragedio en Universo", "Totala suneklipso" kaj "Sekretoj de la marestaĵoj" el Jugoslavio. (Pro manko de loko mi ne povas daŭrigi la denombadon.)

Do ni, la esperantistoj de la t.n. nepagipovaj landoj kial ne aĉetas el ĉi tiuj libroj kiuj estas akireblaj kaj atingebaj, kiujn ne malhelpas la financaj dekretoj? Mi ne scias nur konjektas la respondon: ni devus fari sukcesan propagandon por la intereso de la bonaj esperantaj verkoj. Mi estas konvinkita ke ankaŭ en mia lando multe da esperantistoj ne scias pri la ebleco de libroimporto el orientaj landoj!

Laŭ mia firma opinio troviĝus sufiĉe da libroaĉetantaj esperantistoj sur la Tero, se la esperantistaro legus. Sed — bedaŭrinde! — ne legas!

D-ro K. Kussinszky

Alproksimiĝas la monato de la DONACOJ!

Kion vi donacu?

Kion oni donacu al vi?

LIBROJN!

GEOGRAFIA SEMAJNO EN LEICESTER

Tuj post la Universala Kongreso, de la 12-a ĝis la 19-a de aŭgusto en Leicester (legu : Lester), en Anglujo, okazis la Tria Geografia Semajno de la Internacia Geografia Asocio.

Geografioj, etnologoj, speleologoj, profesiaj kaj amatoraj, kaj personoj interesitaj pri vojaĝoj kaj esplorado el ses landoj kunvenis tie, por plilarĝigi siajn konojn per interesaj prelegoj, ekskursoj kaj aliaj aranĝoj, kaj por pasigi semajnon de agrabla amika kunestado.

La elektita loko montriĝis perfekta, pro la pacoplena atmosfero de la vilaoj de la universitataj studentoj, en kiuj la partoprenantoj loĝis, manĝis kaj partoprenis la prelegojn kaj amuzaĵojn.

La organizanto de la Semajno, d-ro Osborne, ĉion kompetente prizorgis. Li estis same elstara gvidanto dum la du tuttagaj ekskursoj per aŭtobusoj en diversajn urbojn kaj al aliaj vidindaĵoj de la regiono. La prelegoj prezentis mozaikan diversecon el geografio, esplorado kaj parencaj fakoj. La prelegantoj estis: lic. T. Sekelj, prezidanto de IGA kaj de la Semajno, d-ro R. H. Osborne vicprezidanto de IGA, d-ro J. M. Mabesoone, sekretario de IGA, lic. M. Givoje, s-ro J. Kostianen, s-ino M. C. Major. Diskuthoroj, Viva gazeto kaj amuza vespero, dum kiu s-ro E. J. Laurie ĉefrolis, kompletigis la programon.

La lokaj aŭtoritatoj kaj esperantistoj vizitis la semajnon, kaj estis tre helpemaj en la organizaj aranĝoj.

Jus antaŭ la 47-a UK okazos la 4-a Geografia Semajno, ie en Danlando aŭ ĝia proksimeco, laŭ posta anonco.

T. S.

Ŝaka Rubriko

(Gvidas: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Nia problema konkurso.

Kiam ni en februaro malfermis la konkurson, ni certe ne atendis tiel ĝojigan eĥon inter legantoj de la revuo. Tuj post apero de la februara numero venis kelkaj solvoj kaj ilia alfluo ne ĉesis ĝis fino de junio. Entute 55 gesamideanoj el 25 landoj sendis siajn solvojn — el ili nur 8 ne sukcesis trovi la ĝustan movon. Sed precipe la problemo, publikita en maja numero vekis intereson. Ŝajne ĝi estis la plej malfacila el ĉiuj ĝisnunaj problemoj, sed tiuj, kiuj trovis la ĝustan respondon (estis nur 27 gesamideanoj), ege laŭdis la problemon. Kelkaj samideanoj aliĝis al nia konkurso ĝis per solvo de problemoj n-ro 3 kaj 4, do en nia listo de solvantoj estas jam 61 nomoj.

Jen solvoj de la problemoj: N-ro 10 (konkurs problemo n-ro 1): Dfl-f5, N-ro 11 (konk. pr. 2) Ĉf4-e2.

Ĝisnuna stato de nia konkurso: po 5 poentoj havas: E. Hryniewicz (Argentino); C. Meeus, R. Iserentant (Belgujo), inĝ. L. Jordanov (Bulgarujo); V. Kvist, E. Starup-Jensen (Danlando); H. Laine (Finnlando); R. Leger, J. Duthilleul (Francujo); B. Fischer, H. Schindelbauer, K. Ridder, H. Rössler, G. Schikorsky (Germana federacia resp.); E. Maynar, Fr. Gimenez (Hispanujo); B. Skaftfell (Islando); inĝ. T. Restaino (Italujo); J. Aizikowicz (Israelo); W. J. Maier (Kanado); W. Meijus, J. H. Morreau, F-ino C. Brikmann (Nederlando); W. Proskurowski, W. Nastaj (Pollando), R. L. Welther (Rumanujo), T. Lindberg (Svedujo). Po 3 poentoj havas: O. Kuttelwasscher (Aŭstrujo); D-ro C. A. Wutke (Brazilo); T. H. Bohun, J. Řehoř (Ĉeĥoslovakio); Sv. Ziegler (Danlando), Talazac (Francujo), L. Schödl (Germana

demokr. resp.), R. Dresel (Germana fed. resp), H. Sanchez-Latour (Gvatemalo); inĝ. T. Schück (Hungarujo); J. Hogenkamp, L. de Lang Evertsen (Nederlando); B. Babiak, J. Krysiński, Zb. Osarczuk, St. Lisawski, ŝakrondo Wroclaw (Pollando); G. Blumbergs (Sovetio); R. E. Holland (Usono).


ESPERANTA ŜAKO n-ro 1 aperis. Esperanta Ŝak-Ligo Internacia eldonis sian unuan bultenon. Ĝi aperis en julio 1961. Estas nur simpla, dupaĝa bulteno. Sed nun dependas de la intereso de esp. ŝakistoj, ĉu ĝi restos nura informilo pri korespondŝakaj turniroj aŭ ĉu ĝi jam baldaŭ ŝanĝiĝos je bela ŝaka revuo. Ni esperu, ke la unua numero de ESPERANTA ŜAKO atingos ĉiujn esp. ŝakistojn. Se vi ne ricevis la bultenon, skribu tuj al turnirgvidanto de EŜLI, s-ro Jean Duthilleul, 7 rue Commandant Carlan, Briançon (H.A.), Francujo.

Korespondturniroj de EŜLI. Jam ekfunkciis 15a grupo de EŜLI-turniroj. En ĉiu grupo ludas 7 ŝakistoj, ĉiam el 6—7 landoj. Kelkaj grupoj jam finiĝis. En unua grupo gajnis Turowiecki (Pollando); en dua Franzl (Ĉeĥoslovakio), en kvara f-ino Košárová (Ĉeĥoslovakio) kune kun Pötzl (Germana dem. resp.), kaj Lefillastre (Francujo).

Se vi deziras partopreni la turnirojn, skribu al turnirgvidanto, s-ro Jean Duthilleul, kies adreson vi vidas supre.



Problemo n-ro 15 (Konkurs problemo 6) R. Beuthner. Mato en 3 movoj (pro ĝusta solvo 3 poentoj).



Kontrolo: Bl. Rd3, Ddl, (2)

Ni. Rd5, p. c6, d6, e6 (4)

Solvon al gvidanto de la rubriko ĝis 31.1.1962.

RICEVITAJ LIBROJ

En tiu ĉi rubriko ni intencas doni bibliografiajn detalojn pri ĉiuj libroj, kiujn ni ricevas por recenzo. Neeviteble okazas iom da prokrasto inter ricevo de la libro kaj aperigo de la recenzo, kaj tiu ĉi mencio estos kvazaŭ kvitanco pri ricevo; ĝi neniel influas la postan recenzon pri la libro. Ni komencas per la plej freŝe ricevataj:

Jonathan Swift: LILIPUTO. El 1a angla trad. Ethel M. Prent. Eld. Maitland, Londono, 1961. 63p. 18.5 × 12.2 cm.

Jean Forge: LA VERDA RAKETO. Eld. KOKO. Kopenhago, 1961. 146p. 21 × 13 cm.



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

7-aj INTERNACIAJ SKIFERIOJ EN FILZMOOS

Jam aliĝis multaj geamikoj el pluraj landoj al la internaciaj skiferioj kaj skikonkursoj de TEJO en Filzmoos. Sendu tuj ankaŭ vian aliĝon Ankaŭ por la lastaj lokoj ni donos varbpremon de 5%. 1-a etapo : 26.12.1961 vespere ĝis 7-a 1-a 1962 tagmeze.

Pluaj etapoj dum po unu semajno ĝis la 28.1. vespere. Ne plu restas mul-

ta tempo, aliĝu do baldaŭ ! Informpetojn kaj aliĝojn sendu al la redaktoro.

5-a INTERNACIA SEMINARIO DE LA GERMANA ESPERANTO-JUNULARO

La seminario okazos en Köln kaj estos ege interesa. precipe por gejunuloj. La prezoj ne estos altaj pro subvencio. Sendu informpetojn kaj aliĝojn al Ulrich Lins, Köln-Dellbrück, Germanenstr. 146, Germanujo.

DANKESPRIMO EL ĈINIO

Mi kore dankas al sinjoro Günther Becker, prezidanto de TEJO, kiu voĉlegis mian salutleteron dum la oficiala inaŭguro de la 17-a TEJO-Kongreso en Wokingham. Mi ricevis de s-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de LKK. salutleteron kun subskriboj de multaj junaj gesamideanoj el 10 landoj, kiuj brakumis min, sian ĉinan fraton, per varmaj vortoj kaj bondeziroj. Ĝin legante mi estis profunde korusita kaj ne povis reteni mian emocion pro ilia simpatio kaj sincera amikeco. Mi tutkore recipokas la salutetojn kaj bondezirojn kaj sendas al ili... mian plej koran dankon kaj deziras al ĉiuj plenajn sukcesojn en la poresperanta laboro.

Armand SU
1, Kang-Ning Li
Hopei Road
Tientsin, CHINA

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Unika libro aperonta !

BRUNA, unu el la plej grandaj eldonejoj nederlandaj, eldonis plurajn seriojn de "poŝformataj" libroj, inter kiuj ankaŭ serion de fotolibroj pri diversaj temoj.

Unu el la plej sukcesplenaj, "Infanoj ne konas limojn", ĝi decidis eldoni kun teksto en Esperanto. La libro enhavas 111 fotojn pri infanoj de kvin kontinentoj, de oriento kaj okcidento, nordo kaj sudo, blankaj, nigraj, flavaj, brunaj, riĉaj, malriĉaj, gajaj, malgajaj, en ĉiaj situacioj.


Ĝi krome enestas ĉ. 50 paĝoj de teksto, enhavanta eseetojn de kvar diversnaciaj verkistoj.

La libro aperos en decembro

Mendu ĝin grandkvante por la Librotago !

MENDU ĜIN ĈE U.E.A. !

Prezo ekstreme malalta : 2,95 gld., 11,80 steloj





OFICIALA KOMUNIKO

No. 1

Rotterdam, la 1-an de oktobro 1961

GRAVA!

En kunligo kun la nova Kongresa Regularo, bonvolu noti la jenajn gravajn ŝanĝojn:

1. La aliĝiloj kaj ĉiuj kotizoj estu senditaj al la oficialaj Kongresaj Perantoj aŭ rekte al la **Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando.**

Nur la danaj aliĝantoj sendu la kotizon kaj la aliĝilon al: 47-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago K., Poŝtĉekkonto 3266.

Ĉiuj korespondaĵoj estu adresitaj al la Konstanta Kongresa Sekretario ĉe la C.O. de U.E.A.

2. La kotizoj ĝis la 31-a de decembro 1961 estas la jenaj:

Kongresano

n. gld. 40.— aŭ d. kr. 76.—

Edz(in)o de kongresano

n. gld. 20.— aŭ d. kr. 38.—

Junul(in)o ĝis 20-jaroj

n. gld. 15.— aŭ d. kr. 28.50

Student(in)o de 20 ĝis 30-j.

n. gld. 25.— aŭ d. kr. 47.50

Blindulo kaj ties gvidanto

n. gld. 20.— aŭ d. kr. 38.—

Individua Membro de U.E.A. rajtas rabaton de 5.— n. gld. (d. kr. 9.50).

Edzino de membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo. La rabato ne validas por la aliaj kategorioj. Atentu ke la kotizoj kaj la indikoj en pli frue publikigita verda aliĝilo **NE PLU VALIDAS.** Validas nur la **FLAVA** aliĝilo.

Baza Artikolo kaj Enciklopediaj Notoj:

Lokaj Esperanto-Societoj estas petataj organizi almenaŭ unu inform-vesperon pri Kopenhago, pri Danlando kaj pri la 47-a Universala Kongreso. Por tio estas havebla ĉe la C.O. de U.E.A. la jena materialo (senpage ricevebla):

- a. baza artikolo pri Kopenhago;
- b. enciklopediaj notoj pri Danlando,
- c. magnetofona programo pri la Kongreso.

Unua Bulteno:

La 8-paĝa elegante eldonita Unua Bulteno de la 47-a Universala Kongreso, kun bildoj pri Kopenhago, listo de Perantoj kaj provizora programo estas senpage ricevebla, kune kun la aliĝiloj, ĉe la C.O. de U.E.A.

Antaŭ-Kongreso:

La oficiala Antaŭ-Kongreso okazos

en Helsingør, Danlando, de la 29-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 1962.

Prospektoj, kun kompleta programo kaj aliĝilo, estas riceveblaj ĉe: L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando aŭ C.O. de U.E.A.

Statistiko (ĝis fino de septembro):

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 2, Belgujo 4, Brazilo 4, Britujo 23, Bulgarujo 4, Danlando 22, Finnlando 3, Francujo 19, Germanujo 14, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Italujo 8, Japanujo 3, Jugoslavio 6, Libano 1, Nederlando 5, Norvegujo 2, Nov-Zelando 1, Pollando 4, Portugalujo 1, Svedujo 8, Svisujo 1, Usono 1, Katario 1. Entute 143 el 27 landoj.

Konstanta Kongresa Sekretario
G. G. Pompilio,

GEORG SÖRGEL

La Esperanto-movado suferis gravan kaj tragedian perdon. La spirita instiganto kaj gvidanto de la Esperanto-movado en Germana Demokrata Respubliko, prof. d-ro Georg Sörgel, Quedlinburg, mortis akcidente la 12an de julio 1961. Glisilo, per kiu li ŝvebluge veturis, malsupren falegis kaj ĉe la falo Sörgel tuj mortis.

Sörgel estis eminenta mikologo kaj plantpatologo, kaj kun emocio mi memoras lian feliĉon pro sia kunestado kun kolegoj dum faka konferenco en Libano, kiam mi amikiĝis kun li.

Inter la esperantistoj en Orienta Germanujo li estis ĉie amata kiel 'nia profesoro'. Li tie multe kuraĝigis la movadon kaj atingis plifavoriĝon de la tieaj aŭtoritatoj. Longe postrestos la memoro pri lia delikata personeco, lia fekunda entuziasmo kaj energio en la kampoj de sia fako kaj de Esperanto, kaj longe ankoraŭ postefikos kaj donos fruktojn lia sindonemo kaj iniciatemo.

Poul Neergaard

ESPERANTA TEKSTO APERIS EN 115.000 EKZEMPLEROJ

Nuntempe certe ankoraŭ maloftaĵo, kaj en Hungarujo la unuan fojon okazis, ke esperantlingva teksto aperis en tiom da ekzempleroj. La fervoja horaro de la Hungaraj Ŝtata fervojoj, imitinte la bonan ekzemplon de kelkaj aliaj ŝtatoj, aperigis kelkpaĝajn informojn ankaŭ en Esperanto. Sed estus grave, se la vojaĝantaj esperantistoj mem akcelus la praktikan uzon de la internacia lingvo kaj, veturante tra fremdaj landoj, unuavice provu ĉie — ĉe la trafiko, en hoteloj, restoracioj, vendejoj, foiroj, ktp. — paroli en Esperanto: oni vidu, ke ekzistas tia postulo. Laŭ la spertoj kelkfoje oni sukcese povas uzi ĝin. Ekzemple, en budapeŝta granda magazeno oni provis eltrovi la dezirojn de eksterlanda grupo, sed ne tute sukcesis. Unu el ili diris: bona estus Esperanto! Kaj jen hazarde ĉeestanta oficisto de la magazeno povis flue paroli kun ili en la internacia lingvo!

INTERNACIA KORESPONDSEKSERVO IKS EBLIGAS KORESPONDADON POR NE-ESPERANTISTOJ

Amikiĝo inter homoj de diversaj nacioj estas dezirinda celo, tamen neatingebla por la plej multaj homoj, ĉar ili ne scias alian lingvon. Al tiuj homoj volas helpi la IKS-servo.

IKS-Landa-Ofico akceptas leterojn de ĉiu en sia nacia lingvo, tradukas ilin esperanten kaj sendas ilin al fremda lando, kie la tiea Landa-Ofico plu-tradukas en la nacian lingvon de la ricevonto. Tiu pagas nenion. Nur la forsendanto pagas malgrandan sumon, por ke ankaŭ junuloj kaj malriĉuloj povu leterŝanĝi.

La IKS-Centra-Ofico en Crailsheim organizis reton de Landaj-Oficoj kun perantoj (kiuj tradukas kaj peras adresojn) en multaj landoj, ĝis nun en Alĝerio, Aŭstrujo, Egiptujo, Finnlando, Francujo, Hindujo, Israelo, Italujo, Japanujo, Suda-Koreujo, Svedujo, Svisujo, USA kaj Germanujo. Ni serĉas kunlaborantojn en ĉiu lando, ankaŭ en la supre nomitaj. La perantoj (tradukantoj) eĉ ricevas malgrandan pagon por ĉiu tradukenda letero kaj servas kaj al privata, amikeca korespondado kaj al komerca uzo.

IKS laboras kun scio kaj konsento de UEA.

Tiel IKS estas samtempe idealista kaj praktika afero. IKS utiligas Esperanton al ne-esperantistoj, ĉar multaj personoj pro iaj kauzoj ne povas lerni Esperanton, sed tamen volas kontakti kun eksterlandanoj. Kial ne helpi al ili per Esperanto? Certe ni varbos multajn el ili por nia lingvo per nia IKS-servo.

Ni petas vin, la Esperantistojn, kunlabori. Bonvolu skribi por detaloj al IKS-Centra-Ofico, Crailsheim-Germanujo, poŝtkesto 39.

ESPERANTO-GRUPOJ

Trafoliumante la plej novan jarlibron, post ĝojigaj indikoj (kreskis la nombro de reklamoj kaj delegitoj!), mi trovis ankaŭ tre, tre malesperigan; nome la adresaron de Esperanto-grupoj (klubo).


Konsiderante la nombron de la kluboj, la unua rezultato ne estis tre esperiga (292), sed ĉiu komenco estas malfacila, oni rajte povis supozi, ke de jaro al jaro ĉiam pli kaj pli klub-prezidantoj komprenos la utilcon de tiu ĉi adresaro.

Sed kio okazis?

En la jaro 1960, la adresaro konsistis nur el 163, kaj en 1961, nur el 128 adresoj! Malesperiga simptomo!

Plej ĝentile mi petas, ke almenaŭ unue el la milkelkcent klubprezidantoj (kiuj preterlasis fari la farendaĵojn), bonvolu publike motivi, kial ili ne kontribuis al la jarlibro per la menciitaj indikoj? Aliokaze kion oni povas supozi? Nature tion, ke la prislentita motivo estas ne pardonebla indifereco, aŭ neglektemo.

ESPERANTO-PROPAGANDO,
LUND.



"HUNGARA VIVO"

Jen post "Nuntempa Bulgario" kaj "El Popola Ĉinio" aperis nova bela ilustrita revuo dediĉita al diskonigo de la valoroj de individua lando, ĉifoje Hungarujo. Ĝi aperas sub la titolo "Hungara vivo", provizore kvar fojojn jare, kaj kostas egalvaloron de 20 forintoj, aŭ unu dolaro usona. Jam aperis la du unuaj numeroj, kaj ili estas vere interesaj kaj allogaj. Kiel konate, la hungara movado disponas pri elstaraj talentoj, kies ĉefaj figuroj, Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, estas ĉirkaŭitaj de multnombraj bonegaj esperantistoj; ilia kunlaborado super la nova revuo garantias altan kvaliton de la enhavo. Ekzemple, en priliteraturaj artikoloj la poeziaj tradukoj de Kalocsay bone ilustras kaj subtenas la pretendojn kaj opiniojn de la verkintoj.

Cu la revuo estas "tendenca"? Nu, se informado pri la kulturo kaj novaj atingoj de iu lando estas afero en si mem tendenca, supozeble la respondo estas jesa. Sed mi rimarkis nenion en la du aperintaj kajeroj, kiuj devus ofendi la politikajn sentojn de normala homo. Kontraŭe, mi tre ĝuis la kajerojn, kaj tre volonte rekomendas la revuon al ĉiuj esperantistoj.

W. A.

"Fabeloj de Andersen"

Por kompari la tradukon de Zamenhof kun la germana eldono, mi tre scivolas, laŭ kiu eldono li efektive faris sian tradukon. Kiu povas informi min pri tiu demando?

Inĝ. Ib. Schleicher,
Skarspoesvej 41,
Skagen, Danlando

ESPERANTISTA VIVO Naskiĝo

Greutert. Naskiĝis filino Francesca al ges-roj K. Greutert en Guibiasco (Svislando).

Geedziĝo

Vetsch-Fischer. F-ino M. Fischer en Luzern edziniĝis al s-ro Vetsch en Winterthur (Svislando).

NEKROLOGO

Bernhard. La 8an de septembro 1961 mortis 59-jara s-ano Hans Bernhard, Honorofica sekretario de la Katolika Esperanto-Centro en Germanujo. Lia forpaso estas grandega perdo por la katolika Esperanto-movado, speciale en Germanujo. Lia 11-jara filo Hansi estas denaska Esperantisto.

Mills. F-ino Constance Mills, multjara delegitino de UEA por Denton, Anglujo, mortis la 30an de julio 1961.

Ira la Mondo

Aŭstralio

● La 13a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazos en Sidnejo de la 1-a ĝis la 7a de januaro, 1962. Plena, interesa programo estas anoncita.

Aŭstrujo




S-ro Hugo Steiner, fondinto de la Internacia Esperanto-Muzeo, en ĝia Panteono, okaze de lia ora jubileo.

Belgujo

● En "International Associations", grava monata revuo de internaciaj organizaĵoj kaj kunvenoj, de aŭgusto 1961, aperis grava longa artikolo en franca lingvo, kun anglalingva resumo, de nia eks-KKS, s-ro Gian Carlo Fighiera. Ĝi titoliĝas "La rilatoj inter la kongresoj kaj la gazetaro".

Brazilo

● Stratoj Zamenhof kaj Esperanto. Laŭ statistiko starigita de Brazila Esperanto-Ligo ekzistas en Brazilo 30 stratoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto, el kiuj la unua estis inaŭ-



En Harrogate, okaze de la 46a U.K., povis renkontiĝi nia redaktoro, s-ro Auld (maldekstre) kaj nia presejestro, s-ro Zwagers, kiu estas ankaŭ DM de UEA. Kvankam teĥnikaj diskutoj pri la presado de la revuo kaj aliaj eldonaĵoj de UEA okupis grandan parton de ilia tempo, ili sukcesis ankaŭ rigardi la belajn florojn de la kongresurbo, kaj eĉ fotiĝi kune.

gurita en 1913 kaj la trideka en 1961. En Belo Horizonte, Minas Gerais, ekzistas monumento al Zamenhof (1950) kaj obelisko (1957).

● Okaze de Tago de Pollando estis inaŭgurita en la Palaco de la Rektorejo de la Universitato de Brazilo ekspozicio de polaj libroj. Ĝi inkluzivis polajn librojn en Esperanto, pruntedonitajn de Brazila E-Ligo kaj aranĝitajn de f-ino Lila Teixeira. FD de UEA.

● Senpaga specimeno de kafo. Brazila Instituto de Kafo dissendas specimemon de kafo. Skribu kun peto en Esperanto al: Instituto Brasileiro do Café, Departamento de Relações Públicas, Av. Rodrigues Alves, 129, Rio de Janeiro, Brazilo.

● En Banco Nacional do Americo de São Paulo (rua Boa Vista 242, São Paulo) okazis ekspozicio de esperantaĵoj de la 19a de junio ĝis la 14a de julio 1961. Parolis ĉe la malfermo FD pri bankaj aferoj s-ano Francisco de Souza Almada, kaj komenciĝis kurso. La bankoficista asocio "Bancional Clube" disdonigis 500 "ŝlosilojn" al la funkciuloj de la banko. En la kurza sekcio oni permesis meti tabuleton "Esperanto parolata". Bankoficista ĵurnalo "O Bancional" raportis pri la inaŭguro de la ekspozicio. Poŝtkartojn, leterojn kaj esperantaĵojn por la E-centro bv. sendi al s-ro Lacorday Andrade, ĉe la banka adreso.



S-ro Bejko Markov instruas Esperanton al 11-jara Sonja Markova, en bulgara urbo Levski.

Britujo

● **La urbestro de Hastings**, s-ro C. Barfoot, kaj lia edzino ĉeestis la ĝeneralan kunvenon de la Sudorienta Esperanto-Federacio, la 3an de septembro, en Hastings, kaj ricevis ekzempleron de "Zamenhof, Creator of Esperanto" de Marjorie Boulton. La urbestro esprimis simpatian kun la celoj de Esperanto. Oni aŭskultis dissendon de la Pola Radio, kiu salutis la kunvenon, kaj ĉio estis vaste raportita en la loka gazetar.




La urbestro de Hastings kaj lia edzino, kun federaciaĵoj de la Sudorienta Esperantista Federacio.

Nia Delegito en Dover, s-ro Norman H. Smith, treege multe laboris, kun helpo de lokaj esperantistoj, por helpi vojaĝantojn al la 46a U.K. en Harrogate, kiuj trapasis tiun havenurbon. 400—500 esperantistoj trapasis, kaj li aranĝis 310 tranoktojn en Dover, 915 manĝojn, kaj vizitojn al la urbo por 118 samdieanoj. Ni kore gratulas lin.

Francujo

● **La esperantista grupo de Montelimar** ĉijare organizis tri kursojn gviditajn de s-ano Llorens, profesoro en la liceo de tiu urbo. Per ekzameno, 5 gelnantoj de la liceo de Montelimar kaj 5 de la gimnazio de Le Teil estis elektitaj por senpage partopreni karavanon al Torino (Italujo). 27 geesperantistoj partoprenis tiun vojaĝon kaj



Prezidanto de la E-grupo Montelimar metas florbukedon sur la tombon de Prof. Canuto.

renkontiĝis kun la multnombraj torinaj gesamideanoj. Dimanĉon matene, gvidataj de FD-ino Girolidi, ili vizitis la urbon, kaj la prezidanto de la Montelimar-anoj metis florbukedon sur la tombon de Prof. Canuto. "Le Progres de Liono" aperigis longan artikolon pri la karavano.

● **Al la Esperantistaj Rotarianoj.** Laŭ iniciativo de s-ano Genermont, la Rotary-Club en de Moulins (Allier), kun apogo de la R.K. d'Ambert kaj Vichy, lanĉas inter la 400 francaj kluboj (15.000 rotarianoj) vastan agadon "Por Esperanto". La unua etapo estas la voĉdono de rezolucio, kiu petas la enkondukon de Esperanto en la lernejoj. Ĉar ege gravas, ke tiu amasagado estu vigle apogata de la nekontestebla potenco de Rotary, komence la fran-

ca, poste la internacia, la esp-rotarianoj, aŭ simpatiantoj, estas insiste petataj interrilati kun s-o Genermont, arkitekto, place de la République, Moulins (Allier), Francujo, kiu ilin rekte informos pri la projektita laborplano.

S-ro Duchemin, industriisto, Usine du Pont-de-Roux, St-Bonnet-le-Chatel (Puy-de-Dôme), Francujo, intencas organizi ekspozicion en diversaj Rotary-klubo. Li estus tre danko al nia samideano se oni sendus al li materialon por tiuj ekspozicioj: afiŝojn, propagandilojn, dokumentojn, ktp.

● **En 19 seminarioj por instruist(in)oj de Francujo**, Esperanto estas devige instruata. Tio signifas, ke de nun ĉiujare 400 novaj instruist(in)oj havos la necesan kapablon por instrui Esperanton en la unuagrada lernejoj. Antaŭ tri jaroj la instruado okazis nur en 2 seminarioj. Krom tio, la IVa Internacia Konferenco de Popoluniversitatoj, kiu kunvenis en Torino (Italujo) de la 8a ĝis la 10a de septembro, unuanime decidis, interalie, organizi kunvenon-demonstracion en Romo en junio 1962, kies partoprenantoj, po 3 ĝis 10 por ĉiu interesata lando, estus lernintaj Esperanton inter oktobro 1961 kaj junio 1962. Trie, la franca Ministro de Nacia Edukado (Sekcio popola kulturo) patronos, kun grava subvencio, la Kultural Semajnon kun prelegoj de 14 paroladistoj okazontan en Grésillon de la 16a ĝis la 22a de aprilo 1962. Pro tiuj tri faktoj U.E.F. invitos, je sia kosto, po unu el ĉiuj seminarioj kie Esperanto estas oficiale instruata, 19 lernant(in)ojn ĉeesti la Kultural Semajnon en Grésillon, kie oni elektos la 10 junul(in)ojn, kiuj reprezentos Francujon ĉe la dirita kunveno en Romo.

Germanujo

● Ĉirkaŭ 2.000 E-libroj de la antaŭa, famekonata Germana Esperanto-Instituto en Leipzig konfiskitaj dum la Hitler-periodo estas retrovitaj kaj nun troviĝas en la Germana Ŝtata Biblioteko Berlin, GDR, Unter den Linden 8. Por la festo de la 300-jara datreveno de la fondiĝo de la Ŝtata Biblioteko la 23-28an de oktobro la libroj estis aranĝitaj en nove pretigita librotenejo, kaj ili estas denove alireblaj de la esperantista publiko, dum samtempe la kolektado de Esperanto-li-



La infanoj recitas Esperante ĉe E-kunveno en la Medicinista Domo de Kulturo, Moskvo.

broj estas daŭrigata. Pro la graveco de la afero por la tuta Esperantomovado kaj por montri al dubuloj la disvastiĝon de Esperanto, sendu leterojn, poŝtkartojn al la Stata Biblioteko. Ĝi meritas la dankon de ĉiu esperantisto.

● **Mitteilungen der Industrie- und Handelskammer, Nürnberg**, (Bulteno de la industria kaj komerca ĉambro, Nürnberg) aperigis en n-ro 9 de la 1.9.61 artikolon de s-ano Otto Pilhofer sub titolo "Esperanto en la internaciaj komercaj interrilatoj". Estas dezirinde, ke la E-societoj informu sian propran Komercan Ĉambron pri la artikolo.

Hispanujo

● En "La Tosca" (Moyá, n-ro 165) aperis tutpaĝa reprodukto de Papa Benito en Esperanto, de la Esperanto-Grupo Moyá.

Israelo

● Per iniciato de s-ano Leo Ringler revigliĝis la movado en norda Israelo, kaj oni aranĝis renkontiĝojn en — ĝis nun — kvin diversaj lokoj. Nur nun ni informiĝis pri inaŭguro de Zamenhof-strato en Kfar-Ata, kiu okazis la 12an de decembro pasintjara.

Nederlando

● **Fondaĵo "ODIO-kontaktservo"** celas doni spiritan apogon al la multaj korpe invalidoj per la interŝanĝo de sonbendoj. La bendoj surhavas parolatajn leterojn, per kiuj invalidoj kontaktiĝas kun samsortuloj. La fondaĵo tre volonte ricevas adresojn de eksterlandaj esperantistaj invalidoj. Bendoj kun Esperanto-teksto estas jam pretaj. Sekretariino: S-ino S. E. Sparkler, Nieuwlandseweg 73, Hilversum, Nederlando.

Sovetunio

● Tre aktivas en Moskvo E-sekcio ĉe la Medicinista Domo de Kulturo.



Klaso por komencantoj gvidita de s-ro Frans J. Jahger en Pittsburgh, Usono

Jaŭde funkcias rondetoj, ĉiudimanĉe okazas publika prelego en la rusa, tuŝanta problemojn de esperantismo, aŭ ĝenerala — en Esperanto. Foje okazas E-konzertoj kun partopreno de profesiaj artistoj. Tre popularas renkontiĝoj kun eksterlandaj esperantistoj, vizitantaj Moskvon. Moskvaj esperantistoj pli frue ol la kongresanoj de la 46-a aŭskultis la interesan paroladon de Sinjoro A. Brooke. La laboro de la E-sekcio regule konsistigas la laboran planon de la Domo de Kulturo kaj ricevas multan helpon de la direkcio. Rimarkindaj rezultoj de la laboro sekvigis tion, ke la direkcio proponis organizi imponan ekspozicion, dediĉitan al Esperanto, kiun ni planas organizi al la Zamenhofaj tagoj en la mezo de decembro '61. Estas unuafoje postmilita, ke ni havas eblon por ekspozicii en indaj situacio kaj ejo. Samideanoj de la tutmondo estas petataj kontribui al la ekspozicio per freŝaj gazetoj, fotoj, bildkartoj, libroj (tre

bonvenaj estas la medicinaj en E kaj ankaŭ nacilingve), manlaboroj de infanoj (kun nomo, adreso, aĝo, dezirinde foto). Ĉiu ricevos dankan bildkarton. Oni bonvolu indiki se kaj kiun rekompencon oni deziras: albumoj, gramofondiskoj, abono por la ĉina kaj la vjetnama revuoj ks. Adreso: USSR. Moskvo, K-9. Gercenstraat 19.

Usono

● Pli ol 150 studentoj partoprenis en somera kurso de Esperanto en Pittsburgh, sekve de artikolo en la influa revuo "Family Magazine". La kursojn gvidas s-ro Frans J. Jahger. La loka grupo, "Amikoj de Esperanto" havis budon ĉe Popolfesto de la 5a ĝis la 7a de majo, kaj du semajnojn poste intervjuo kun s-roj Jahger kaj D. H. McClellan estis dissendita de radiostacio WPIT.

● "Labor and the curse of Babel" estas la titolo de nova propaganda flugfolio de Mark Starr (39-40 47th Street, L.I.C. 4, Novjorko).

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO
N-ro 342

La 1-an de oktobro 1961

DELEGITOJ

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de septembro kaj ankaŭ por komparo je la fino de septembro 1960.

Asociaj membroj	13895	17226
Individuaj membroj		
MJ	814	807
MA	4991	5190
MS	559	477
Pat.	5	2
DM	350	415
HM	43	43
J-MJ	28	32
J-MJ	186	168
	6976	7134
	20871	24360

Aŭstralio

Wyalkatchem (Western Australia) D: vakas.

Belgujo

Liège (Liège) D: S-ro André Coppé, komerca reprezentanto, Quai de Rome, 76.

Brazilo

Caxambu (Minas Gerais) D: S-ro Francisco M. Viotti, kuracisto, Rua Venceslau Brás 75.

FD: (Medicino): La D.

Ibiraci (Minas Gerais) D: S-ro Virgilio Vitoriano, juĝa oficisto, Caixa postal 81 — Rua Cel. Temóteo, 193 — Ibiraci-Sudoeste Mineiro (Via Franca — S.P.—L.M.)

São José dos Campos (São Paulo) D: S-ro Alcyr Guedes de Almeida, bankoficisto, Rua Dr. Gaspar Resende 37.

Britujo

Gloucester (Gloucestershire) FD : (Fervojoj) : S-ro Frank Curtis, stacies-tro, Station House, Grange Court, Westbury-on-Severn.

Germanujo

Hamburg (24a) FD (Esperanto-Instruado) : S-ro Karl-Heinz Flemming, policisto, Hamburg-Langenhorn, Westedestieg 5.

Hispanujo

Huete (Cuenca FD (Naturismo) : S-ro Luis Angel Ramírez Teruel, telegrafestro, Telegraf-officejo.

Hungarujo

Miskolc (B.A.Z. megye) D : D-ro Lajos Györy Nagy, advokato, I., Petöfi u. 11.—

Israelo

Tel-Aviv FD (Medicino) : D-ro Henryk Maschler, kuracisto, Str. Hapardes 11.

Kostariko

San Jose D : John E. Falk, pensiulo, Apartado 3911, C. A.
FD : (Bahaismo) : La D.

Nederlando

Santpoort (Noord-Holland) D : S-ino Wilhelmina P. Lok-van Putten, dommastrino, Brederodelaan 36.

Pollando

Wroclaw (Dolny Slask) D : S-ro Aleksy Lasiński, radia redaktoro, Pola Radio Wroclaw.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

RADIO ROMA. 3-XI, Itala komponisto Vincenzo Bellini; 7-XI, Tra la literaturo; 10-XI, La fama ĥirurgo Raffaele Bastianelli; 14-XI, Novaĵoj el Italujo; 17-XI, Leterkesto kaj bibliografio; 21-XI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 24-XI, Sankta Katarina el Siena; 28-XI, La Ulisido Marko Polo kaj Uliso de Dante. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj : S-ro Luigi Minnaja kaj Prof. D-ro Vincenzo Musella.

Svedujo

Hova (Västergötland) FD : vakas

Usono

Pasadena (California) D : vakas
FD (Bahaismo) : vakas

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Zwagers, S-ro W., Rotterdam, Nederlando.

Masuhr, S-ro Adalbert, Elmshorn, Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ

468. Almada, S-ro Francisco de Souza, São Paulo! 469. de Freitas, S-ro A. Wantuil, Rio de Janeiro; 470. Gaio, S-ro Jorge, Rio de Janeiro; 471. Pitta, S-ro Hermes, Salvador; 472. dos Santos, S-ro Manoel, Muritiba, Bahia, Brazilo.

FONDAĴO PROF. CANUTO

Antaŭa stato : 241 MA, 30 MJ, 6 J-MJ kaj 1 J-MA.

S-ro A. Lacalendola, Italujo, 1 MA.
Entute : 242 MA, 30 MJ, 6 J-MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto" 1960).

DONACOJ POR INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro J. S. Aafjes, Nederlando, 10 gld.; F-ino Vera Zlotnikova, Sovetunio, 3,93 gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

ANONCETOJ

AVERTO! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Ne necesas esti tre sperta esperantisto por komenci korespondadon kun alilandanoj; korespondado helpas perfektigi per praktika uzado de la lingvo kaj samtempe estas plezuriga kaj interesa formo de lernado. Se vi estas komencanto, tamen jam kapabla skribi facilan leteron, memlernanto, izolulo, sen ebleco rekte praktiki la lingvon, sendu korespondpeton al la Koresponda Servo de UEA : adreso K.S.M. 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (PdD) Francujo, kies celo estas havigi al ĉiuj gekorespondemuloj letergeamikojn en la tuta mondo. Uzantoj de K.S.M. rajtas je senpaga enskribiĝo, sed ne povas postuli rektan respondon de la korespondservo. Iliaj adresoj estas transdonataj al uzantoj, kiuj aldonas respondkuponon por rekta respondo. (unu RK por ĉiu petata adreso aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn). Atentu, ke la RK estu maldekstre stampitaj. Bonvolu preslitere skribi viajn nomon, antaŭnomon, kompletan adreson kaj aldoni detalajn informojn pri vi mem : aĝon, profesion, ĉefajn interesojn ktp. por faciligi la plenumadon de viaj deziroj. K.S.M. ĉiam estas dankema por bon-

volaj, postaj informoj pri la stato de viaj interrilatoj : sukcesoj, malsukcesoj kaj ceteraj spertoj akiritaj per la uzado de la korespondservo.

Mi bezonas kunlaboron de esperantistoj por organizi en ĉiu lando Iniciativan Agentejon (enlanda kaj eksterlanda komerco; turismo; reklamado; informa kaj komerca tekniko; solvo de transportaj kaj ekonomiaj problemoj; reprezentado; ktp.) Ankaŭ mi akceptus kunlabori en similaj organizaĵoj. Oni ne bezonas koni la komercan mondon nek havi kapitalon. — D-ro V. Petro Signes, Monjas Clarisas, 20- Oliva (Valencia), Hispanujo.

S-ro Walter Lager, Lutterottistr. 2, Innsbruck, Aŭstrujo, nur korespondas per PI (afranko skribflanke).

Latinlingvajn lerneajn gazetojn kolektas tutmonde por gimnazia ekspozicio : D-ro J. Kondor, Kastl/Amberg/Opf. Germanujo. Rekompenco laŭ deziro. Ĉiam validas.

18-jara finna kamparfilo volas korespondi kun junuloj kaj junulinoj de tuta mondo. Intereso : fotografio, filatelio. Osmo Laakkonen, Pienviljelijäkoulu, Ilomantsi, Finnlando.

Kiom vi amas Esperanton? Ĝis kia grado vi ŝanĝus vian vivon por fina venko? Ĉu vi jam senesperigis (ruiniĝis materie) perdis sanon? Ĉu vi sentas, ke via vivo similas al tiu de Zamenhof? Ĉu vi pretas dediĉi la vivon (rezigni pri nacia lingvo) riski morton? Ĉu efektive sufiĉas nur ĝisnunaj metodoj? Pensu kaj skribu al

D. Soleo, 14 B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Al ĉiuj korespondantoj kaj geamikoj, kiuj helpis kaj ankoraŭ intencas helpi nin per esperantaĵoj por fari ekspozicion, ni informas, ke ni transloĝiĝis kaj nia nova adreso estas : Geedzoj G. Kalkman, Blois van Treslongstraat 55, Vlaardingen-W., Nederlando.

Kolektas, interŝanĝas stampojn de Esperanto- (kaj Ido-) kongresoj, de Ruĝa Kruco (mark, stamp.) foto-kopiojn de gravaj mondlingv. okazaĵoj. E. Andereg-Gurtner, Horn/Bodensee, Thurg., Svislando.

Al ĉiuj samideanoj. — Vi certe ricevos Parizan il. p.k. se vi sendos al mi p.k. kies bildo prezentas nacikostumojn, regionfestojn, muzikistojn, rajdistojn, bestojn ktp., stampitajn per belaj p.m. S-ro Jean Plat, 36, rue Voltaire, Levallois-Perret (Seine), Francujo.

Leteresperon organizas la 31-a regiona Kongreso (Rouen). Sendu amase bildkartojn. Nepre respondos S-ro Jouis, 67, rue G. Mugnier, Boisguillaume (Seine Mme), Francujo.

Belan frontispicon havas "William Penn" majstra prelego de Prof. E. Privat pri paca pioniro. 4 rpk. aŭ steloj. Kvakera Esperantista Societo, 5 Cotham Park North, Bristol, 6, Anglujo.

Leo Ringler, (antaŭe en Boryslav-Tustanovice, Pollando), petas kontakton kun siaj malnovaj korespondantoj. Lia nuna adreso : Blokonim 95, Kfar-Ata, Israelo.

VERKOJ DE MAŬ ZE-DONG

(Esperanta Eldono)

Pri Praktiko

bind. 0.70 gld., 0.20 US \$, 0-1-5 £

broŝ. 0.35 gld., 0.09 US \$, 0-0-8 £

Pri Popoldemokratia Diktaturo

bind. 0.70 gld., 0.19 US \$, 0-1-5 £

broŝ. 0.30 gld., 0.08 US \$, 0-0-8 £

Interparolo Kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong

bind. 0.65 gld., 0.18 US \$, 0-1-3 £

broŝ. 0.25 gld., 0.07 US \$, 0-0-6 £

Eldonis : Ĉina Esperanto-Ligo

Mendu ĉe : UEA, la landaj perantoj ktp.

aŭ ĉe : la Administracio de Ĉina

Esperanto-Ligo,

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

LA LITERATURAJ VERKOJ

kaj

ALAJ ESPERANTAĴOJ DE ĈINIO

Ĉina Antologio bind. 7.00 gld., 2 US \$

Vivu Leninismo broŝ. 1.00 gld., 0.30 US \$

Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko
bind. 4.25 gld., 1.20 US \$

Rakontoj pri la Fantomspitantoj
broŝ. 1.25 gld., 0.36 US \$

Okcidenta Ĉambro (bildrakonto)
broŝ. 0.75 gld., 0.20 US \$

Floroj kaj Birdoj (bildkarto-serio)
broŝ. 0.50 gld., 0.20 US \$

Eldonis : Ĉina Esperanto-Ligo

Mendu ĉe : UEA, la landoj perantoj ktp.

aŭ ĉe la Administracio de Ĉina
Esperanto-Ligo

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.

FERMENTARIO

GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO

unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo

D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana lingvo tradukita de Prof. Manuel
Fernández Menéndez kaj reviziita de
Akademiano D-ro L. C. Porto Carreiro Neto kaj
Prof. Ismael Braga.

Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj
antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.
Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero;
bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Prezo US \$ 2.00 (du dolaroj) afrankite

La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj
kaj la eldoninto

URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO

Calle Yaguarón 1397 - MONTEVIDEO (URUGVAJO)

UNESCO COURIER

granda kultura revuo eldonata de
U.N.E.S.C.O.

publikigis en sia numero de decembro
1959 grandan artikolon pri Zamenhof

Tiu numero en angla, franca, hispana aŭ
rusa lingvo estas ankoraŭ ricevebla ĉe U.E.A.

Montrinda al ĉiuj neesperantistoj

Prezo : inkl. sendkostojn : 0,50 gld; 2 steloj.

Mendante, indiku la deziratan lingvon !

BELARTO 1961

aperanta !

Redaktis ĝin WILLIAM AULD

Rapidu ! Mendu ĝin tuj per la mendilo trovi-
ĝinta en la oktobra numero de "Esperanto".

Prezo nur 3.— gld (12 steloj) por ind.
membroj de U.E.A.

Por nemembroj 3,50 gld. (14 steloj)

Por la Tago de la Homaj Rajtoj

(la 10-a de decembro)

estas riceveblaj ĉe U.E.A.

12 BELEGAJ FOTO-AFIŜOJ

kun Esperanto-teksto, pri la

HOMAJ RAJTOJ

Eldonis UNESKO Prezo : 4 int. resp. kuponoj aŭ
egalvaloro por la tuta serio.

Utiligu ilin en viaj decembraj solenaĵoj

DANA ANTOLOGIO

ĵus aperis

**Impona verko, kiu donas bonegan superri-
gardon pri la dana literaturo**

260 paĝoj

38 ilustraĵoj pri la aŭtoroj

**Konatiĝu kun la kulturo de la venontjara
kongreslando !**

Prezo : 11.— gld bindita
8,50 gld broŝurita

Eldono : Centra Dana Esperantista Ligo
Mendu ĉe U.E.A.

MALSATA ŜTONO

de Rabindranath Tagore

Tradukis el la bengala lingvo L. Sinha
Serio Oriento-Okcidento no. 1

En "The British Esperantist", sept. 1961 s-ro E.
Ockey skribas pri la rakontoj :

"Ili estas el tiu speco, kiu restas eterne valora.
Eble parte pro la bonega stilo de la tradu-
kinto kaj kontrolintoj, ili ofte memorigas pri
la homaranismaj ideoj de Zamenhof, sed al-
donita estas milda ironio simila al tiu de
Baghy, kvazaŭ iu puŝas en la ripojn per
ridetanta fingro."

En letero al la eldonejo la administranto de "Es-
perantologio", ministeria sekretario E. Svane,
skribas :

"Dankon pro via nova eksterordinare belega
libro — kaj laŭ la enhavo kaj laŭ la vestaĵo
— kiu pliriĉigis la Esperantan literaturon —
kaj min ! Laŭdon kaj gratulon !"

Eldonita de

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
sub aŭspicioj de U.E.A.

Prezo : broŝ. gld. 8.50, bind. gld. 11.50

Mendu ĉe UEA

Norda Prismo

kultura - socia - literatura

ilustrita revuo internacia -

kun kristala valoro

komencos sian okan jaron en 1962.

Cefredaktoro :

D-ro Ferenc Szilágyi

Döbelnsgatan 66

Borås (Svedlando) Tel. 244 22

Redaktoroj :

Baldur Ragnarsson

(Reykjavik, Islando)

Johan Hamond Rosbach

(Sarpsborg, Norvegujo)

Vilho Setälä

(Matinkylä, Finnlando)

Poul Thorsen

(Kopenhago, Danujo)

Jen unu letercitaĵo el la multaj : "Estas ĉiam ĝojiga
momento, kiam alvenas via mirinde bela kaj tre
interesa revuo." (C. H. el Clermont).

Abonanto, paganta antaŭ la 15-a de jan. 1962 (laŭ-
eble tuj do) ĝuas favoron kaj pagas abonprezon
de 10 sv. kr., t.e. 2 us. dol., 25 rk, 29 steloj. Poste
oni pagas 12:- sv. kr., 2:50 us. dol., 35 st., 30 rk.

Administrejo : Barnhusg. 8. Stockholm

Vi ricevos por tiu ĉi prezo ses numerojn (5-fojojn)
riĉenhavan, interesan revuon.

Abonojn peras ankaŭ UEA.

"JUGOSLAVIA FERVOJISTO"

Monata fervojista Esperanto-revuo, estas organo
de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj
(JAFE).

Tiu ĉi bela revuo aperas jam ses jarojn regule
monate, kaj ek de la numero 5/1961 ĝi estas
presata, sur bona papero, riĉe ilustrita sur 24
paĝoj + kovrilpaĝoj en granda formato.

Krom la fakaj kaj primovadaj rubrikoj, ĝi enhavas
ankaŭ jenajn rubrikojn : "El fremdaj fervojoj",
"Ekkonu nian landon", "Ekkonu la mondon", "Nia
rakonto", "Fakaj terminoj", "Humoro", k.t.p.

Pere de ĝi Vi povas konatiĝi kun la socipolitikaj,
ekonomiaj kaj kulturaj atingoj de Jugoslavio.
Estas menciinde ke ek de la numero 1/1962, ĝi
publikigos en daŭrigoj "Historion de Esperanto-
movado en Jugoslavio" de la konata publicisto kaj
verkisto Marinko Givoje.

Ni alvokas Vin aboni tiun ĉi interesan kaj varian
revuon rekte ĉe la eldonanto, uzante devizan
konton kurantan por eksterlando : 400-11; 31806-250-
1505, "Jugoslavia Fervojisto", Zagreb, Mihanoviće-
va 12, Jugoslavio.

Jarabono por eksterlando estas 4 guldenoj; aŭ 16
steloj.

Abonebla antaŭ ĉe U.E.A.